REGO

 **RUSIA ESPERANTO-GAZETO** 

komuna eldono de REU kaj REJM ***№ 2 (2) decembro 2000***



la krasnojarska klubo festas sian jubileon

en la numero:

"Kelkaj ŝtonetoj..." de Mikaelo Bronŝtejn
rakontoj kaj impresoj pri 5-a LF kaj StRIGo-6
la historio de KEK kaj raporto pri ĝia jubileo
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"
kluba vivo en Roslavl kaj Nabereĵnie Ĉelni
nova rubriko "Libra revuo" kaj literaturaj paĝoj
interesaj informoj, novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2000

NIAJ HOMOJ

en Krasnojarsk










...kaj...

Naberejnie Ĉelni









P.S. La esprimo "niaj homoj" subkomprenas ne la homojn de iu certa nacio, kiel suspektis apartaj personoj laŭ la antaŭa numero, sed la homojn proksimajn al ni laŭ spirito (ekz. esperantistojn). – La red.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin)



Kelkaj ŝtonetoj ĉe la sojlo de jarmilo

Ja, bonŝancas al ni, karaj gevivantoj! Ni ĝisvivis la jaron kun duo kaj tri nuloj, ni estas venintaj al la sojlo de la tria jarmilo. Tiu magia nombro entuziasmigas kaj humiligas samtempe. Iuj sentas aŭgurjukadon. Kaj ili ekaŭguras katastrofojn, nepre katastrofojn, en tre vasta diapazono. Maksimume – la mondofinon. Minimume – definitivan pereon de Esperanto-movado. Ili trovas tion (ankaŭ pri Esperanto) ĉe Nostradamus. Ne temas pri iaspeca progreso – ĉu progreso estas profita temo por finjarmila aŭgurado? Iuj sciencapoge prognozas. Ili trovas argumentojn, analizante faktojn, altirante la bezonatajn jeorele kaj kunkudrante la bildaron per blankaj fadenoj. La bildaro, certe, rezultiĝas sufiĉe nigra por ke la fadenoj aspektu pli okulfrape. Kelkaj pli ŝatas retrospektivon. Tiuj kalkulas – ekzemple, ili adicias la ĉiujaran membraron de UEA dum lastaj kvindek jaroj, dividas la ricevitan sumon per la kvanto de aŭstraliaj kunikloj, multiplikas je la aĝo de la nova rusia prezidento, subtrahas imposton por eksporto de majskaraboj al Islando kaj konkludas, ke dum la pasinta jarcento kvanto de esperantistoj denaskaj kreskis ne tre aktive. Nu vidu: ĉiuj ili volas min timigi, ĉu mi ŝatu tion? Mi diras al ili ĉiuj, ke min ne koncernas ĉio ĉi – retrospektivoj, prognozoj, eĉ aŭguroj. Samkiel diris iu prudentulo: "Min neniel koncernas mia morto: dum mi vivas ĝi estas for, sed kiam ĝi venas – mi forestas." Mi ne kredas la nombromagion. Mi povas festi la judan novjaron, aŭ la orientan – tie la nombro tute ne estas tiom impone glata. Tamen homoj petas ion diri ekster aŭgurado, kaj mi estimas la petintojn. Jen do, kelkaj opinioj, konvenaj por la jarmilŝanĝo.

Pri la Retsako. La lastaj dek jaroj de la jarcento igis homojn tute proksimaj, spite al la distancoj inter ni. Komputilo, modemo – kaj jen vi estas lasita en la virtualan mondon. Tie ni ĉiuj estas kune – ĉiuj komputilposedantoj, ne nur esperantistoj. Ni povas vagadi en la senlima TTT-mondo, vizitante sennombrajn hejmpaĝojn. Ni povas enretiĝi kaj ekbabili mesaĝe kun amikoj, aŭ kun tute nekonataj geuloj... Laŭ mi, tiu ĉi fenomeno por ni, espanoj havas du flankojn – bonan kaj malbonan. La Retsako estas bonega kaptilo. Esperantistaj komunikadoj en la virtuala mondo estas almenaŭ ne malpli interesaj ol la ceteraj. Vagado en tiu mondo estas amuza, unuavice por junularo, do, granda peko nia estus neglekto de tiu mondo por informado, instruado kaj amuzigo de eventualaj venontoj al nia vojo. Mi ne preterlasu la okazon por fanfaroni, ke en 1993, dank' al iniciato de Andreo Ananjin, miaj "Legendoj pri SEJM" iĝis, ŝajne, la unua virtualigita libro en esperanto. Nu, la progreso daŭras. E-komunumo junulara en Ŝakefield (Britio) pasintjare montris al mi sian retpaĝon – tie eĉ Zamenhof (virtuala) kantas "La Esperon"! Kial do min ne tro ĝojigis, eĉ tute ne ĝojigis la lasta informo pri foriro de "El Popola Ĉinio" en la virtualan mondon?... La Retsako estas bonega kaptilo. Sed tie ja estas multaj logaĵoj ekster espa parto. Do vi povas kaptiĝi, ekzemple, en la anglan – tiu kolosa monstro ŝvelas monde dank' al la Teksaĵo kvazaŭ bone fermentita pasto. Lasta jardeko almenaŭ iom instruis nin pri konkurenco en iu ajn merkato. Ankaŭ en la lingva tio okazas. Sekve, ni devas normale

eniĝi la konkurencan batalon, interalie, en la virtuala mondo. Temas nun ne pri venko, laŭ mi, – pri elvivo. Ni ne perdu la esperon: se brita junularo tamen venas al esperanto, ni ankoraŭ havas ŝancon. Mi nenion diras pri utilo de la Retpoŝto. Ĝi estas evidenta eĉ por esperantistoj.

Pri la "lingvo kara". Bonvolu akcepti unu citaĵon nelongan el ruslingva ĵurnalo: " На вечере эсперантистов любопытна одна чёрточка: обмен мнений и весь разговор вёлся на одном только русском языке. Создавалось такое впечатление, как будто эсперантисты не совсем ещё свыклись с мёртвым искусственным языком и предпочитают ему живую человеческую речь." Ĉu vi rekonis, karaj?... Estas tamen "Петербургская газета", la 21-an de aprilo 1910. Ĉu multe ŝanĝiĝis niaj klubkunvenoj? Foje la ironiema Simo Milojeviĉ skribis, ke uzo de esperanto en la kunvenoj de samlingvanoj estas nur ludo. Sed ja – utila ludo, aŭ eĉ tute ne ludo, sed trejnado por praktika uzo de la lingvo! Lingva klubo laŭesence estas la loko, kie homoj parolas la ŝatatan (ne la denaskan) lingvon. La francan, la anglan, la hebrean – kun plezuro. Endas do almenaŭ iom zorgi, ke en esperanto-klubo estu parolata esperanto. Kun plezuro. Mi scias ke ĉiu klubo trovas sian rimedon por instigi homojn al tio. Kelkaj pelas "krokodilojn" for el la klubejo, kelkaj prenas monpunon de tiuj, kelkaj priŝercas. Mi malsekretigu, ke ankaŭ ni en la Tiĥvina klubo krokodilemas. Sed por ĉiu kunveno ni decidis disponigi la unuan duonhoron por tiuj, kiuj volas paroli nur esperante. Do, tiuj venas la unuaj. Poste venas la ceteraj, ankaŭ ne malbonaj homoj, kaj ni teumas jam esperante, "krokodile" kaj eĉ "aligatore", ĉar estas kelkaj ŝatantoj de la franca. Ĉio multe malpli bonas, se "krokodilado" inundas dum niaj amasaj aranĝoj. Tion ni ĉiuj rimarkas dum lastaj jaroj. Laŭ aserto de Valentin Melnikov ruslingvaj programeroj en la lastaj SEJT-oj estas eĉ planataj anticipe kaj abunde. Mi ne tute kredas, ke speciale. Sed la fakto elokventas, kaj la grumblado de kelkaj rigoruloj ne estas senbaza. Ĉu eblas tute eviti "krokodiladon" en niaj renkontiĝoj? Kaj – ĉu endas? Laŭ mi, ne. Mi ne estas rigorulo. Mi tre ŝatas junularon, precipe ĉarmulinojn vigle babilantajn ruse, zorgantajn tamen fojfoje pepeti espe. Nur du "sed" pikas mian nukon. La unua: sed la aranĝo kun pli ol duono da brilaj, sed ruslingvaj programeroj estas amasujo ("тусовка") amikiga, ĝuinda, kaj senutila por vastigo de la lingvo. La dua: laŭ mi ne nur ekonomia situacio, ne nur abundiĝo de aliaj distraĵoj sed ankaŭ similaj aranĝoj rezultigis nunan sufiĉe rakitisman SEJM-on (pardonu, REJM-on) kaj la tro feblan REU. Certe, la unua havas du-tri internacie gravajn aktivulojn kaj la dua – du-tri internacie gravajn ambiciojn, sed tio ne multe ŝanĝas la situacion.



Pri la rondo familia. Estis bonega lernantino en mia antaŭtrijara E-kurso. Pli ol plenaĝa, sed tre kapabla kaj tre deziranta ekparoli la lingvon. I.a. – multjara gvidantino de la


urba popolkoruso, pro kio mi havis certajn planojn rilate ŝin. Post fino de la elementa kurso ŝi jam ne timis paroli, aktive memorfiksis ĉiun novan vorton, kaj mi decidis, ke ŝi estas maturiĝinta por viziti iun E-aranĝon seriozan eksterlande. Ni iris al la aranĝo sufiĉe prestiĝa, sufiĉe amasa kaj kun bona esperanto... Plej mirigis mian lernantinon okulfrapa konateco inter la partoprenintoj – ĉiuj ili ne la unuan, eĉ ne la dekan fojon estis kunvenintaj por amuziĝi en la rondo amika, kaj... ni estis iom fremdaj por ilia kutima rondo. Eble mi ne tro sentis tion, estante okupata pri mia prelego, poste pri koncerto, poste pri drinketo kun unu malnova konato. Sed ŝi – ŝi diris poste: "...Estas iaspeca nemalica sekto, ĉu ne?". Ne, ŝi ne iĝis malamiko de la lingvo kaj de ties adeptoj. Sed sekvantsomere anstataŭ UK ŝi iris al ordinara turisma vojaĝo al Italio, revenis kun bonegaj impresoj kaj ne plu vizitas nian klubon. Eble pro okupateco... Kio, do, ni estas? Kio ni estu poste? Ĉu vere sekto? Aŭ la proklamita antaŭnelonge Civito, kies Manifeston(!) mi legis ie? Kaj, se ni varbas kaj edukas novajn civitanojn, ĉu ni iel ritigu ilian aliĝon al la sekto? Ĉu ni varbu kaj eduku senlime, aŭ ekzistas ia optimuma kvanto da sektanoj-civitanoj? K.t.p. Mirindas, ke neniu ĝis nun provis konstrui E-movadon laŭ la fama (aŭ fifama) sistemo de piramidoj. Eblus tion ligi al mono (samkiel "MMM" kaj multaj aliaj), aŭ – preferinde – al sanproblemoj. Tiuj interesas ĉiujn: homo malsana emas kredi ekziston de ia ĉionpova universala kuracilo, sed ankaŭ sanuloj interesiĝas – por ajnokazo. Aperadas preskaŭ regule, diversprosperaj "Herbalife", "Sunrider", "Airos" k.a. Do, aperu la iniciatinto, digna nivele de la glora Marc Huges, kun animŝira historio pri la amata avinjo, kiu tro malfrue komencis lerni esperanton, kaj pro tio ne sukcesis venki la mortigan laksadon! Do, ekparolu propagande ularo, portanta la insignojn: "Se ci volas esti sana – demandu min" (kun la verda stelo, aŭ sen – ne tre gravas)! Do vendu tiu ularo la lingvon podoze kaj kreskigu aron da vendistoj sub si! Kaj efektiviĝu rezulte la slogano, kiun mi aŭdis de iama "lajfisto" Volodja Soroka: "Ni sidigu la planedon sur la produktaĵon!". Jen do.

IJK-51, okazinta apud St.Peterburgo en 1995, estis unu el la plej brilaj paĝoj de Rusia E-historio. Tamen verŝajne ne multaj memoras, ke la unuan fojon la ebleco de ĝia okazigo en Sovetunio estis oficiale pridiskutita ankoraŭ en la fora 1989. Jen kion ni povas legi en "Eksciu, ke..." n-ro 11(23), junio 1989: "La redaktoro de TEJO-tutmonde Andi Künzli (Svislando), staĝinta en Moskvo, 20.06.89 helpe de M.Ĉertilov renkontiĝis kun la estro de la propaganda fako de CK VLKSM A.Zinĉenko. Okazis longa konversacio pri la celoj de TEJO kaj ebleco de kunlaboro. A.Zinĉenko diris, ke li opinias utila okazigi Internacian TEJO-kongreson en USSR ie en la 90-j jaroj." Interese estas, ĉu la organizintoj de IJK-51 memoris pri tiuj vortoj de la funkciulo de CK VLKSM. Almenaŭ pri unu s-ro A.Zinĉenko estis prava: okazigi gravajn kaj grandajn internaciajn aranĝojn estas vere utile. *(P.Fiŝo)*

Skrapado de nuko pri UK. Mi estus ŝanĝonta la nomon REU al REEU – Rusia Eŭropa Esperanto-Unio. Tio respegulus realan staton de la aferoj. Fortaj kaj iam fortaj movadcentroj en transurala parto de la ŝtato apenaŭ partoprenas agojn de la Unio klube aŭ individue. Domaĝe. Ni povus multon fari kune pli bone ol dise, eble eĉ efektivigi la plej altan ambician impeton – organizi la Universalan Kongreson de Esperanto en Rusio. Estu mi sincera – ankaŭ mi estas adepto de tiu ambicia impeto, sed, memorante la iaman sperton, mi opinias la sukceson de la enterpreno dubinda. Por inviti la UK-on al Moskvo ni

bezonas tri S-aĵojn: Sobran organizan teamon, Subtenon de Luĵkov, Samideanon Samodaj. Laŭ mi dume ni nenion el tio posedas en Moskvo. Eĉ ne La Samideanon S. antaŭ ol li konsentos helpi. Analizante apudajn solvojn, mi ne parolu pri Peterburgo, kiu certe estus unu el la plej taŭgaj postkongresejoj kune kun Kievo (pardon' – Kijivo!) kaj kelkaj aliaj. Mi aludu pri Jeburgo. Tiu grandurbo posedas sobran teamon. Tiu teamo verŝajne ricevos la Subtenon de Rossel pli facile ol la moskva – tiun de Luĵkov, ĉar Rossel estas pli atingebla kaj ŝatos la UK-on kiel unu plian manifestiĝon de sia memstara pozicio. Kaj Samideano S.? Nu, li venos... Strange, ke ĝis nun ne anoncis sin Vilnjuso, ĉu ne?

Re – pri "La Ponto" kaj pri aliaj forgesitaj rimedoj. Do, kion pri Vilnjuso? Pri Riga, Tallinn, Jerevano kaj aliaj ĉarmaj, vizitendaj urboj... Ekzemple, ni fosu en la memoro kaj diru, ĉu multaj rusianoj dum lastaj kvin jaroj vizitis la tradiciajn BET-ojn? Ĉu neniu? Domaĝe. Ĉu iu esperantisto tiea venis al niaj aranĝoj? Ne? Domaĝe. Certe la kaŭzoj estas tute simple diveneblaj. La plej grava – vizoj, kiuj kostas ĉ. 20 USD. La samon kostas vizo al ajna ŝtato, do, ĉe elektokazo ni elektas UK-on aŭ IJK-on, sendube. Ankaŭ ili. Ja estas tamen lokoj por almenaŭ renkonti malnovajn amikojn! Foraj lokoj... Jen kio okazis. Movadoj kaj movadetoj en t.n. ekssovetiaj ŝtatoj iel-tiel ekzistas, kelkiuj eĉ pli bonfarte ol "en la tempoj de glora SEJM". Sed, kuiriĝantaj en propra suko, ili multon perdas. REU kaj REJM pli aktive kunlaboras nur kun la movadanoj en Ukrainio, malpli – en Belorusio kaj neniom en aliaj intaj respublikoj. Mi volas memorigi al pliaĝuloj kaj informi la novan generacion, ke en 1989, ĉu ne pro la antaŭsento de proksima disfalo de la ŝtato, mi proponis en la refonda SEU-Kongreso fondi ankaŭ la interrespublikan koordinan organizon "Ponto"; estis verkita eĉ statuto de tiu organizo. Tiam la ideon homoj renkontis fride. Ĉiuj volis liberon. Ĉu ne maturiĝis jam la kolektiva prudento ĝis la kompreno, ke krom libero, krom sendependeco dezirindas, tre dezirindas ankaŭ kunlaboro inter la najbaraj E-komunumoj? En la komenco de la nova jarmilo mi pretas tiri for el mia arkivo la statuton de "Ponto" (arkaikiĝintan, refarendan, certe), viŝi polvon de sur ĝi kaj montri al dezirantoj. Se aperos tiuj. Ĉar homoj iom pigriĝis. Aŭ mergiĝis plene en aliajn okupojn, kaj ne rimarkas eĉ la rimedon, kiu, utilega kaj fruktodona tuj kaj por ĉiuj, kuŝas surface kaj atendas. Mi aludas kunlaboron kun ĝemelurbaj esperantistoj. Vojaĝante tra Eŭropo mi multfoje devis aŭdi plendojn, ke ne troveblas esperantistoj en rusiaj ĝemelurboj. Jen la lasta plendo: dum la postkongresa ekskurso en Israelo mi multe parolis kun geedza paro el la germana ĝemelurbo de nia Jaroslavlj, kaj ricevis la plendon. Aĥ, kiajn planojn havas la germanoj pri la onta kunlaboro! Ĉu vi aŭdas, s-anoj el Jaroslavlj? Speciale por vi kaj por aliurbaj espaj komunumoj mi rakontu, kiel amikas tiĥvinaj esperantistoj kun la ĝemelurbaj samideanoj. Do. Ĝemelurboj aperis ankoraŭ en la sovetia epoko. Ankaŭ Tiĥvin sukcesis ĝemeliĝi komence kun la finna Imatra, poste – kun la franca Herouville. Ni havis tiam iajn-tiajn kontaktojn kun esperantistoj el Imatra, sed niaj kontaktoj, se diri milde, estis ne tro aprobataj de lokaj oficialuloj. Dezirantoj povas legi



pri tio pli detale en “Oni ne pafas en Jamburg”... Sed venis “perestrojko” kun siaj bonoj kaj malbonoj. La unua bono por ni, provincanoj, estis la ebleco kontakti eksterlandon, kaj unuavice – ĝemelurbojn. Do, la amikaj leterinterŝanĝoj ĝoje cedis la lokon al personaj konatiĝoj kaj kunlaboro, utila por ambaŭ flankoj. En la fino de 1991 la vicurbestro de Herouville speciale aranĝis tagmanĝon por la unuaj tiĥvinanoj, venintaj neoficiale, kiel simplaj civitanoj. Certe estis esperantistoj. Sekvis poste multe pli amasaj vizitadoj; mi eĉ kuraĝu diri, ke preskaŭ ĉiu aktiva klubano estis en la ĝemelurbo kaj (aŭ) akceptis la ĝemelurbajn esperantistojn gaste. Multis ne nur vizitado sed ĉiaspeca interhelpo. Ekzemple pri organizo de la ekspozicio el muzeo de Rimskij-Korsakov en Francio. Esperantistoj francaj tiam savis la situacion. Francaj esperantistoj, veturante al Tiĥvin eĉ ricevis taskojn de la Urbodomo pli vastajn ol esperanto-okupoj. Mi menciu ankaŭ ion el ekzotikaj formoj de kunlaboro. Nu, multego da florbedoj en Tiĥvin ĉiusomere buntas florplene pro la semoj, donacitaj de la ĝemelurbanoj-esperantistoj; ankaŭ la brasiko “Coeur de boeuf” (bovkoro) bonege maturiĝas en niaj legomĝardenoj. Sed ĉefa gajno estas, ke pro la firmaj ligoj kun la ĝemelurboj nian espan komunumon estimas la loka registaro, kun ĉiuj avantaĝoj, kiujn enhavas tiu estimo.

La redakcio nenion korektis en la artikolo kaj publikigis ĝin tiel, kiel skribis la aŭtoro. Sed por kelkaj legantoj verŝajne necesas klarigi du esprimojn: “espo” – Esperanto; “Jeburgo” – Jekaterinburgo. La artikolo estas daŭrigota. – La Red.

5–a Lingva festivalo en Ĉeboksari

Jekaterina Ignatjeva (Ĉeboksari)

Se fari sociologian esploron kaj demandi: “kio estas via plej granda revo?”, inter la respondoj oni nepre trovos: vidi la tutan mondon, konatiĝi kun novaj homoj, havi novajn neforgeseblajn spertojn… Bedaŭrinde tiu revo ne ĉiam realiĝas. Vojaĝoj ligiĝas al monaj, vizaj kaj tempaj problemoj, kaj plejmulto el ni anstataŭigas ilin per konstanta televidĉeesto kaj gapado al ĉiuj specoj de programoj… Certe tio tute ne kompareblas kun la ebleco vidi kaj sperti ĉion “per propraj okuloj”. Sed… Se vi ne povas viziti la mondon, ĝi mem pretas veni al vi!



la esperantistoj kantas por la ĉeboksaranoj

Parolado, ŝercoj, kantoj en ĉiuj eblaj lingvoj: la hispana? la bretona?! la tibeta?!! en kvardek lingvoj?!!! Bunteco ne nur de kostumoj, sed eĉ de homa haŭto, centoj da partoprenantoj (ĉasantaj la subskribon de plej diversaspektaj kaj ne similaj unu al la alia instruistoj el diversaj landoj, aŭ kunkantantaj en la nepala), varmega etoso de VERA internacia komunikado, gastoj de la tuta terglobo! Se vi legis tion ĉi kaj komprenis, ke iam vi tion ĉi vidis samtempe en unu loko, neniu dubo – vi partoprenis en Lingva Festivalo! En Ĉebok-

sari, Ĉuvaŝio, la 21-22-an de oktobro 2000, Lingva Festivalo okazis jam la 5-an fojon. Jubilean. La organizantoj ofte ŝatas diri, ke la Festivalo estas vera festo de internacia komunikado. Kaj efektive ĝi estis tia ankaŭ ĉi-foje, eĉ pli jubila, gaja kaj etosiga ol antaŭe!

Ne eblas eviti statistikaĵojn: en la programo, kiu ĉi-jare konsistis el du etapoj (la antaŭa



ili ĉiuj prezentis siajn lingvojn

kaj la ĉefa), partoprenis pli ol 4000 homoj el 20 landoj kaj 5 urboj de Rusio!!! (ĉ.3000 kaj ĉ. 1000 respektive). Estis prezentitaj 40 lingvoj de la mondo (inter kiuj la unuan fojon prezentiĝis la tibeta, la persa kaj la kartvela). En la konkurso de infanaj pentraĵoj partoprenis pli ol 500 gelernantoj el la mezlernejoj ne nur de Rusio, sed ankaŭ de Serbio. Urbaj amaskomunikiloj aperigis pli ol 10 programojn kaj artikolojn pri la aranĝo!

Aparte menciita estas sukceso de la antaŭa programo, kiu komenciĝis unu semajnon antaŭ la Festivalo, ekde zorgoj pri la subita ŝanĝo de festivalejo kaj nekredeblaj klopodoj de la organizantoj kaj helpantoj el Moskvo kaj Ivanovo venigi kaj akcepti eksterlandajn gastojn (ne ĉiam simplas eniri Rusion, kaj des pli ĝin eliri!). Dum la antaŭa programo okazis renkontiĝoj kun la gastoj de la Festivalo en urbaj lernejoj kaj universitatoj, vizitoj de la gastoj al lokaj instancoj, kies agadkampo estas ligita al lingvoj (ekz. Ĉuvaŝa Nacia Kongreso), intervjuoj, gazetarkonferencoj kun gastoj kaj organizantoj de LF en respublikaj amaskomunikiloj, ekspozicioj de diverslingvaj libroj (certe ankaŭ en Esperanto) en urbaj bibliotekoj, kaj brila "Semajno de fremdlingvaj filmoj", dum kiu en la plej granda urba kinejo "Sespelj" estis montritaj al pli ol 1000 spektantoj 10 filmoj en la lingvoj angla, franca kaj germana!



Sonja Petroviĉ parolas serbe, Danil Kapitonov "tradukas"

Nekredeble abunda estis ĉi-foje la kvanto de venintaj gastoj: la 5-an Lingvan Festivalon vizitis reprezentanto de Eŭropa Buroo de Malpliuzataj Lingvoj Bertrand Menciassi (Bruselo, Belgio), direktoro pri scienco el Hungara Kultura Centro en Moskvo Josef Goretitj, reprezentanto de la Konsulejo de Francio en la urbo Niĵnij Novgorod, respondeculo pri la evoluigo de la franca lingvo Jeaqueline Boularia, moskva akademiano A.Votinov, kaj certe plej bonvenaj esperantistoj: la prezidanto de TEJO Sjoerd Bosga, REU-estraro en plena konsisto (Andrej Ananjin, Jurij Karcev, Garik Kokolija), prezidanto de Hungara E-Junularo Vera Ascadi kaj reprezentanto de Serba Esperanto-Junulara Organizo Sonja Petroviĉ. Ĉio ĉi donis altan prestiĝon al la Fes-

tivalo, des pli, ke ĉi-foje ĝi estis pretigita sub aŭspicioj de Komitato pri Junularaj Aferoj de Ĉuvaŝa Respubliko sub gvido de ties estro Jevgenij Petrov.

Dum la ĉefa prorgamo de LF (la 21 – 22-an de oktobro) la Urba Palaco de Junularo kaj la Respublika Pedagogia Universitato, kie okazis la Festivalo, apenaŭ enmetis la grandegan homamason, kiu inundis ilin. Po kelkhoroj tage la partoprenantoj vizitadis lingvoprezentojn, kie entuziasme lernis dialogojn en la turka, skribis sian nomon en bengali, amkonfesis en la hungara kaj salutis unu la alian en ĉiuj eblaj lingvoj. Dufoje dum la Festivalo okazis koncertoj: la unuan vesperon – de la ensemblo de mezepoka muziko "Totus Floreo" el Uljanovsk kaj post la fermo de la Festivalo – granda internacia koncerto. La etoso estis amikega, kaj dufoje, dum la malgranda teumado por gastoj, instruistoj kaj organizantoj kaj aparte dum la solena fermo, sonis plej varmegaj gratuloj al la Festivalo kaj dankvortoj al ĉiuj, kiuj helpis organizi tiun ĉi grandan, vere internacian feston… Ĉiuj havis la impreson, ke LF finiĝis tro rapide.. Sed nun ĉio estas finita, disveturis gastoj, finfine satdormis la organizantoj… Kaj… jam tempas eki prepari Lingvan Festivalon por la jaro 2001!

P.S. Junulara E-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko esprimas sian plej sinceran dankon pro la helpo al Oĉjo Dadaev, Garik Kokolija, Nastja Baŝlikova, Vitalij Malenko, Alekseo Besĉastnov, Natalja Grigorjevskaja kaj ĉiuj aliaj, kiuj helpegis fari tiun ĉi LF sukcesa.

La 11an-12an de novembro 2000 en Västerås (Svedio) okazis la 1-a Lingva kaj Kultura Festivalo. Ĝi estis organizita far fortoj de lokaj esperantistoj kun subteno de lokaj asocioj de enmigrintoj. Dum la Festivalo estis prezentitaj 33 lingvoj de la mondo inkluzive du minoritatajn lingvojn de Svedio. La partoprenantoj multe ĝuis la programon de la Festivalo, kiu inkludis ĉi-foje ne nur tradiciajn koncertojn de naciaj dancoj kaj kantoj, sed ankaŭ tiom interesan eron, kiel manĝoj de diversaj popoloj. Sian nacian kuirarton prezentis por publiko kurdoj, grekoj kaj somalianoj. La Festivalo kolektis multajn entuziasmajn lingvoambasadorojn de pluraj landoj, kiuj firme decidis kune pretigi sekvajaran Festivalon por pli vasta publiko de ĉiuj interesiĝantoj. *Willem Posthuma (ret-info)*

Aike Müller (Germanio)

Post monato en Moskvo mi finfine unuafoje vizitis lokan kluban renkontiĝon. Tie oni zorgis pri tio, ke mi ne maltrafu la Lingvan Festivalon kaj helpis min tuj aĉeti la trajnbileton. Kelkajn tagojn poste mi eksciis, ke mi ankaŭ en Ĉeboksari estos bonvena, kaj ke oni verŝajne eĉ havos taskon por mi: prezenti la germanan lingvon. Mi iomete ŝokiĝis, ĉar kiel germanino mi ja neniam estis lerninta pri la plej gravaj ecoj de mia lingvo kaj ankaŭ gajaj ekzemploj pri ĝi ne sufiĉe envenis mian kapon. Por saviĝi el tiu situacio mi aĉetis libron pri germana gramatiko kaj forsendis retpoŝte helppeton al ĉiuj germanlingvaj amikoj. Sekve dum tiu semajno mi eksciis multan interesan pri mia gepatra lingvo kaj ricevis aron da afablaj respondmesaĝoj. Tamen mi ankoraŭ ne certis pri kion finfine fari dum la duonhora prezentado, kiam mi vendrede vespere sidiĝis en la noktan trajnon al Ĉeboksari…

Tiu mia unua vojaĝo en Rusio (triope) estis bela sperto, kaj matene ĉe la stacidomo atendis nin lokaj esperantistoj. Post meto de la pakaĵoj en studentloĝejan ĉambron kaj revido kun aliaj moskvaj esperantistoj okazis la urbekskurso apud la Volga golfo por la gastoj. Dank' al diversaj multlingvaj ĉeboksaranoj verŝajne ĉiuj el nia internacia grupo komp-

renis, kion diris la rusa ĉiĉeronino. Ankaŭ grupfotado per multaj fotiloj ne mankis. Posttagmeze estis la programo de la unua festivala tago. La malferman (kaj poste la ferman) programon mirige lerte buntigis antaŭ ĉio la infanoj de la loka kreema centro per internaciaj dancoj. La "instruistoj" prezentis sin mem per saluto al la publiko. Vane mi esperis, ke ne devos supreniĝi sur la scenejon kaj paroli antaŭ la plenplena de ĉeboksaranoj halo.

Timiga surprizo por mi estis, ke mi dum la du tagoj eĉ kvarfoje devis prezenti la germanan: mi ja neniam antaŭe parolis dum duonhoro antaŭ fremdaj homoj, des pli ruse. Sed estis tutbona sperto, ĉar la aŭskultantoj (ne malpli ol dudek ĉiufoje) estis tre afablaj, viglaj, interesiĝantaj kaj kunlaboremaj. Multaj fotiĝis kun mi aŭ petis min skribi por ili iun germanlingvan bondeziron, kelkaj eĉ petis mian adreson por skribi al mi poŝtkartojn nur por praktiki la germanan. Tamen mi multajn certe ne kontentigis. Problemo estis ke la publiko estis sufiĉe miksita: venis kaj okjaraj lernantoj kaj kvindekjaruloj, kelkaj preskaŭ nenion sciis pri la germana, aliaj jam bone scipovis paroli ĝin aŭ eĉ iam loĝis en Germanio. Post la unua prezentado mi ne plu sekvis miajn notojn, sed demandis la aŭskultantojn pri iliaj deziroj. Ili eĉ kantigis kaj desegnigis min. Entute tio kaj la 28 horoj entrajne estis bonega trejnado en la rusa, kaj post la semajnfino ŝajnis al mi ke mi ĝin flue parolas.

"Panjo", demandas Joĉjo, "kial paĉjo havas tiom malmultajn harojn?"
"Ĉar via paĉjo estas tre inteligenta kaj li multege pensas."
"Kaj kial vi havas tiom multajn?" *(esperanto-anekdot)*

La alia flanko estis sperti post longaj monatoj denove Esperantujon: estis mia kvina ne nur loka aranĝo. Ankaŭ ĉi-foje mi fartis kvazaŭ revante. Mi revidis jam konatojn kaj ekkonis multajn por mi novajn ĉarmajn rusiajn esperantistojn. Ĉiuj zorgis pri mi kaj subtenis min, kiam mi nervoziĝis. Speciala surprizo kaj tial ĝojo estis renkonti mian nederlandan tendnajbaron de lastjara IJK, kiu tiam ankoraŭ estis novulo, kaj nun jam pli bone parolis Esperanton ol mi. Ni ambaŭ same malmulte kredis niajn okulojn, kiam ekvidis unu la alian kiel lingvoprezentanton sur la scenejo. Sambelege estis revidi mian afablan matracnajbarinon de lastjara IS. Vespere post bufedo kaj dancado por la "instruistoj" kaj gastoj mi ne ege emis iri al miaj aĵoj en la malinteresan studentloĝejan ĉambron. Mi do ege ĝuis ke mi havis alian tranoktinviton, aŭ, pli precize, ke oni jam decidis en kies hejmo mi restu dumnokte. Tie ni sesope kuiris, manĝis kaj babilis kaj mi endormiĝis kun la sento esti en granda familio.



dum REU-prezidanto manĝas en la paŭzo, REJM-prezidanto sonoras por la komenco de vicaj lingvo-prezentoj

Lunde matene mi alvenis en Moskvon kun la ideo, ke mi forestis dum la semajno. Oni povis aŭskulti 7 prezentadojn el 38 diversaj prezentitaj lingvoj; mi mem, bedaŭrinde, ne aŭskultis eĉ unu. Sed verŝajne tiel miaj impresoj estis multe pli fortaj. Tamen ĉar lingvoj estas mia granda pasio, mi esperas iam kiel aŭskultanto denove viziti la lingvofestivalon. Al mem Ĉeboksari mi ĉiukaze jam baldaŭ denove vojaĝos por revidi amikojn. Fine mi ŝatas danki ĉiujn, kiuj min tiom kore akceptis kaj ankoraŭ akceptos ĉi tie en Rusio.

Andrej Grigorjevskij (Ivanovo)



En Ivanovon 4-7 de novembro 2000 al la 6-a StRIGo (Studa renkontiĝo de iniciatema generacio), venis ĉ.100 personoj. La apartaĵo de la renkontiĝo estis, ke ĝi estis lastmomente translokita el Tverj (kie oni rifuzis pri la ejo), al Ivanovo (kie ĝi urĝe troviĝis). Kaj tio okazis tri tagojn antaŭ la komenco de la kunveno (!!!). Do, mi ĝis nun kun kortremo atendas informojn pri malfeliĉuloj, kiuj vagis tra la malgastamaj stratoj de Tverj, serĉante esperantistojn... Principe tio povis okazi al iuj riskemuloj, kiuj ne regule kontaktas la aliajn esperantistojn. Ja ankaŭ la definitiva informo pri la adreso en Tverj estis dissendita eble 10 tagojn antaŭ la komenco – kaj nur retpoŝte. Certe al la samaj adresoj tuj estis senditaj informoj pri la lokŝanĝo, ankaŭ telefone oni multajn atingis. Pri ĉiuj ceteraj eroj la renkontiĝo estis tute sukcesa. La temo estis "kluba laboro". Enkadre de StRIGo okazis aktivul-trejna seminario de REJM – certe pri la kluba organizado kaj aktivado, ankaŭ mem la programo de StRIGo estis "prikluba" ⊂ ekz. KGS. Kutime la aferojn gvidis la partoprenintoj de la aktivul-trejna seminario. Ili ricevadis la teoriajn sciojn kaj tuj sekvis la praktika tasko laŭtema enkadre de la enrenkontiĝa klubo. La kluboj rezultiĝis vere aktivaj kaj amikecaj. Dum la pridiskuto unu el izolitaj esperantistoj diris, ke nun li sentas sin malfeliĉa, ĉar en lia urbo ne estas E-klubo. Dankegon ankoraŭfojan pro la koncepto kaj okazigo de la aranĝo al ĉiuj, speciale al Irina Gonĉarova, la plurjara kunordiganto de StRIGo.

Oleg Kuznecov (Klin)

Impresoj de StRIGo-6 en Ivanovo

Ĉarma urbo Ivanovo – loĝloko de miaj E-amikoj – gastamis min per varma vetero kaj bonaj lokanoj. Jam ĉe la busa stacidomo mi renkontis afablan viron kiu volonte direktis min al StRIGejo. Tie, kontraŭkutime, mi trovis la lernejon № 65, en kiu ni loĝis, varma. Estis tre agrable. Kiel kutime ni loĝis en klasaj ĉambroj surplanke kaj tio bonas. Jam forgesitaj de la lasta StRIGo-5, kiu okazis en Kostroma, impresoj de lernejana vivo revigligis la memoron. Nekonataj dume kunloĝantoj amasis en la ĉambroj kaj strebis al komunikiĝo.


Oleg Kuznecov festas sian naskiĝtagon

La organizantoj inventis 4 novajn klubojn kaj metis ŝildojn kun nomoj de iliaj urboj sur pordojn. Kaj jen post kelka tempo en Esperantujo jam aktivis freŝaj E-kluboj el Tverj, Rjazanj kaj Tula. Tio vere helpis al la temo de ĉi StRIGo "Kluboj kaj kluba vivo". En la ĉambro "Tambov" loĝis infanoj kun siaj gepatroj. Kaj jam al solena malfermo venis multaj homoj. Krome pluraj venis post 1 aŭ 2 tagoj. Ho ve – malmultaj estis veraj kaj rigoraj

esperantistoj. Do, sekve – lingva etoso iĝis iom kripla, SED abundis ege entuziasmaj novicoj kiuj aktivis dum la kursoj kaj olimpikoj. Feliĉe, la etoso de E-renkontiĝoj konserviĝis. Dankon al organizantoj de la programo kaj al aktivuloj. Mi volas rakonti pri kelkaj eroj el la abunda programo. Estis ege ĉarmaj, neforgeseblaj kaj miraklaj Teo-ceremonioj, kiujn gvidis Roma Bolŝakov kaj doktoro Pavel Volkov. Dum ili sonis versaĵoj en la rusa lingvo kaj en Esperanto (hajkoj). Krom tio Roma prezentis videofilmon pri sia vojaĝo al Hindio ĉi-printempe. Tre plaĉis al mi lingva olimpiko, en kiu partoprenis multaj komencantoj el niaj Kluboj. Nun mi estas plene konvinkita, ke kreskas-aperas novaj fortaj esperantistoj kiujn ege bezonas nia movado. Aktiva partopreno de "novaj" kluboj en Konkurso de Gajaj kaj Spritaj kaŭzis furoran sukceson de ĉi aranĝo. Spektantoj kaj ĵurianoj tiom ridis, ke iam eĉ ne povis paroli. Dum nepra nokta programo estis bonaj t.n. Refleksioj – aranĝoj, dum kiuj oni sidante en amika rondo de freŝaj klubanoj rememoradis impresojn de ĵus pasinta tago. Funkciis bufedo kaj butiko, kie oni povis, parolante nur en Esperanto, ricevi ion por satigi la stomakon kaj la cerbon. Temas pri belaj libroj kaj ege utilaj vortaroj, kiujn prezentis Jurij Karcev (Juka) el Uljanovsk.

Kelkaj gutoj de malmielo trafis StRIGon pro ŝanĝo de loko, multaj krokodiloj kaj stagnado de nia kara E-movado (de idea vidpunkto). Kiucele ni organizas E-ajn renkontiĝojn por neesperantistoj? Laŭ mi por ili plej taŭgas Lingvaj festivaloj kaj koncertoj de E-muzikantoj. Alimaniere niaj renkontiĝoj baldaŭ iĝos ne en Esperanto kun rusa traduko SED en la rusa por ĉiuj kun traduko al E-o por kelkaj. En kursoj de Esperanto dum renkontiĝoj novicoj en unua tago strebas ekscii pli kaj pli. En sekvaj tagoj lernantoj nur ripozas post noktaj vagadoj, kvankam ie interne deziro lerni la lingvon restas. Reveninte hejmen sen praktiko ili multon baldaŭ forgesas. Ne, ne, ne, mi ne plendas, sed ĉu ekzistas senco organizi tiujn kursojn? Ja klubaj kunvenoj en E-kluboj pasas ordinare en la rusa. Internaciaj E-kontaktoj okazas en la rusa, angla kaj germana lingvoj. Kion ankoraŭ ni povas fari por misuzi nian amatan lingvon? Mi ne opinias min 100%-e prava, tamen... Tamen mi volonte ricevos viajn reeĥojn kaj diskutos pri ĉi temo ĉu private, ĉu sur paĝoj de REGo.


unuafoje mi vidis "Dĵon Braun" kantatan ne surstrate

Jelena Budinovskaja (Moskvo)

"Kluba vivo" fariĝis devizo de la pasinta StRIGo-6, okazinta en Ivanovo. Alvenantajn al la renkontiĝo homojn jam dum la registrado oni loĝigis en diversajn "kluboĉambrojn". Oni preferis enskribi samurbanojn al diversaj "kluboj", tiel ke partoprenantoj el diversaj urboj povu interŝanĝi sperton.

Kelkfoje tage, dum kelkaj horoj en la "kluboj" okazis laboro: al la homoj estis donita tasko, kiun ili devis plenumi al certa tempo. Mi ne povas juĝi pri la laboro de ĉiuj "kluboj", ĉar vidis nur finan rezulton, sed en mia klubo tuj estiĝis gvidoro. Mi opinias, ke

en aliaj “kluboj” okazis same. Ĝuste por tiuj personoj (certe ankaŭ por ĉiuj aliaj dezirantoj, kiuj tamen estis nemultaj) okazis paralele kun aliaj programeroj specialaj seminarioj, kie kun ili oni interŝanĝis sperton, kiamaniere en formo de ludo (kaj poste en reala vivo) kunigi homojn ne simple en aron, sed en klubon, kie ĉiu scias siajn taskojn kaj strebas al komuna celo. Tiuj horoj, dum kiuj la partoprenantoj kunvenis en la “kluboj”, nomiĝis “kluba laboro”. Indas emfazi, ke tio efektive estis laboro, sed, kiel oni scias, multaj esperantistoj iras al E-renkontiĝoj por komunikiĝi kun la konatoj, kiujn ili delonge ne vidis, pasigi kelkajn tagojn en agrabla etoso. Tial necesas laŭdi la organizantojn, kiuj fojfoje simple persvadis la homojn disiri al la “kluboj” kaj iom labori.

En tiu ĉi StRIGo estis multaj novuloj kaj ĝuste ili plej entuziasme rilatis al kluba laboro. Inter la partoprenantoj, kiuj unuafoje venis al StRIGo, mi ne vidis tute indiferentajn, tiujn, kiuj ne sciis pri kio okupiĝi. Ĉar la kluba laboro estis nur malgranda ero de tio, kio okazis dum tiuj tagoj en Ivanovo. E-kursoj, KGS, Poezia vespero, koncertoj de niaj kantistoj, Heloŭino, kursoj pri masaĝo kaj pantomimo, teaj ceremonioj – unuvorte la programo ĝojigis per abundo, kaj enuis nur la pigruloj. Ege impresis verŝajne jam tradiciiĝinta trejnado “Seĝoj”. Ni havis eblecon alie ekvidi tiujn, kun kiuj apude ni loĝis dum ĉiuj tiuj tagoj, kaj ne ĉiam tio novvidita karakterizis la najbarojn de bona flanko.


la prepariĝo al Heloŭino estis ne malpli amuza ol la festo mem

Verŝajne ĝuste laŭ la impresoj de novicoj eblas grandparte juĝi pri la sukceso de la aranĝo. Estis tre agrable vidi admiron en la okuloj kaj aŭskulti iliajn impresojn. Sed la “veteranoj” povas kompari tiun ĉi StRIGon kun la antaŭaj. Mi partoprenis en tri StRIGoj el la ses kaj ĉi-foje sentis mankon de Esperanto. Certe tio dependas de la decido de organizantoj – ĉu devigi homojn paroli en E-o aŭ ne. Sed la novicoj devas havi eblecon plene engaĝiĝi la lingvon, kaj tiel nomataj “verdaj zonoj” ege helpas al tio. Ĉi tie vi scias, ke se vi ne diros tion, kion vi bezonas, en Esperanto, oni vin ne komprenos, malgraŭ ke vin ĉirkaŭas homoj, parolantaj en via gepatra lingvo.

Fine mi ŝatus diri, ke unu el la indikiloj pri la sukceso de StRIGo por mi fariĝis knabino, kiu veturis al ĝi agordita se ne kritike, do almenaŭ kun ioma dubo: “Ĉu necesas?…”. Kaj lastatage ŝi diris : “Mi volas lerni Esperanton.”

(tradukis Garik Kokolija)

Vjaĉeslav Ivanov, Denis Kan (St.Peterburgo)

Post-StRIGa eŭforio.

Ĉi-jare StRIGo planatis en Tverj, sed lastmomente la ejestroj en Tverj rifuzis akcepti la aranĝon kaj ĉio translokiĝis al Ivanovo (tre proksime, ĉu?). Pro tio kelkaj homoj ne venis, sed la plej persistaj ĝisveturis. Ekzemple ni du atingis unue Tverj-on trajne, poste – Moskvon elektrotrajne, poste – Ivanovon petveture. Tamen profundnokte en la komenco de dimanĉo ni jam partoprenis en la StRIGo, lacaj kaj dormemaj, sed feliĉaj. Okulfrapis abundo da novaj vizaĝoj dum ĉi StRIGo. La kutima (apud)moskva teamo estis tuttempe

prezentita nur de Irina Gonĉarova, Katja Bebenina kaj Olego Kuznecov. Por iom da tempo venis ankaŭ Oĉjo, Garik, Onjo k.a. Tamen la etoso estis tre varma: aŭ pro tio, ke novaj homoj strebis interkonatiĝi, aŭ pro la elektita temo… La temo de la StRIGo estis iom neatendita. La aranĝo estis dediĉita al kluba vivo.

Vespera programo montris veran iniciatemon de la kunvenintoj (ja StRIGo estas "…renkontiĝo de iniciatema generacio"!). Ofte tute spontane organiziĝis rondetoj por diversaj ludoj, anekdot-rakontado, simpla babilado kun teo aŭ sen ĝi. Vere sukcesis la festo de Heloŭino, kiam strange vestitaj geknaboj kun pentritaj vizaĝoj dancis, saltis, kantegis, ktp-is ĝis mateno. Ne mankis laŭtega muziko kaj sufiĉa spaco. La "animo" de la festo estis ia stranga sorĉistino kun dresita muso (Sonja Ŝejnina kaj Olga Kuleŝova el Ivanovo), kiuj … – nu ne scias ni – aŭ ordigis la kaoson, aŭ kaosigis la ordon.

La ejo estis nek varmega nek malvarma, kio ege gravas en batalado kontraŭ dormemo. Se paroli precize pri ni du, eĉ se ni ekvolegus dormi, tio apenaŭ eblus, ĉar ĉiuj tri niaj lanaj litkovriloj ĉiam troviĝis aŭ sur ies postaĵoj, aŭ sub ies kapoj. Jen kie ni sentis la feliĉon de komuna vivo, la noblan senton de varmofordono al geamikoj! Tamen en tiu bonega ejo mankis verdaj zonoj. La tuta lernejo similis al krokodilbieno, kaj povraj unuopaj esperantistoj fuĝadis al la stabejo – la lasta Esperanto-insuleto… Nepraj ĉiutagaj dreskursoj por la krokodiloj daŭris nur po unu horo kaj ne multe ŝanĝis la lingvan bildon de la Renkontiĝo. La 5-n de novembro okazis EtaLONo (Lingva Olimpiko por Novuloj) gvide de Irina Gonĉarova. La Olimpiko mirigis multajn, ĉar evidentiĝis, ke malantaŭ krokodilaj mienaĉoj ofte sin kaŝis novaj E-talentoj. La gajnintoj ricevis belegajn kristalajn strigojn. StRIGo-6 estis unua E-renkontiĝo, kie ni trovis oficialan fumejon. Dekomence estis iel strange, sed poste ankaŭ ni, "eternaj komencantoj" en fumado, plurfoje aperadis en la fumejo kaj multe babilis tie.

> Idisto butikumas en granda magazeno. Li trovas okulvitrojn kiuj senvestigas homojn! Senhezite li aĉetas. Li surmetas la okulvitrojn, kaj konstatas ke efektive la homoj estas nudaj; kaj kiam li formetas ilin, la homoj estas denove vestitaj. Bonege! Kaj piedirante hejmen, li ludas tiel, metante kaj formetante la magiajn okulvitrojn. Alveninte hejmen, li malfermas la pordon de la dormoĉambro, kaj li vidas sian edzinon kun la leterportisto sur la lito, tute nudaj. Li formetas la okulvitrojn, kaj li vidas ilin ankoraŭ nudaj. Li remetas ilin, kaj ili plu estas nudaj. Li ekkoleras: "Imagu, mi pagis 100 eŭrojn por tiuj ĉi okulvitroj, kaj ili jam ne plu funkcias!" *(esperanto-anekdot)*

En KGS geknaboj montris sian gajan agadon dum imagita Ago-Tago. Tio estis vera KGS kun multaj konkursoj kaj senkompata ĵurio. Poste la tri kluboj kune formanĝis dolĉajn premiojn en StRIGa kafejo. Lastatage okazis "Ronda Tablo", dum kiu multaj el tiuj, kiuj vizitis StRIGon jam ne unufoje, plendis, ke estis malmulte da lingvaj programeroj, ĝenerale malstreĉita programo, ke ege malhelpis la lastmomenta ŝanĝo de StRIGo-urbo, ke… nu, unuvorte, grumblaĉis. Tamen al novicoj la aranĝo plaĉis – do ĝi sukcesis. StRIGo ja estas populariga kunveno. Ekzemple Denĉjo (Kan) post-StRIGe ekardis per la ideo organizi fortan E-movadon sur sia naskiĝinsulo Saĥalin. Li komprenas, ke organizado de StRIGo aŭ SEJT en tia foro ne multajn entuziasmigos, sed espero, bazita sur malgajaj pensoj pri povraj sen-esperantaj saminsulanoj, ne lasas lin.

Ĝis la revido dum sekva StRIGo! Ĉu en Saĥalin?

Estontaj aranĝoj

Jurij Karcev (Uljanovsk)

Konatiĝu: OkSEJT-41 en Uljanovsk!

Nun estas vintro, sed ĉu iu dubas, ke venos somero? Kaj ĉu iu dubas, ke venontsomere okazos fama tendaro OkSEJT?

> ***OkSEJT*** *– Okcidenta Somera (antaŭe – Sovetia) Esperantista Junulara Tendaro – la plej konata kaj multnombra el rusiaj tendaroj. Ĝia historio komenciĝis en la jaro 1959. Ĉeforganizanto de OkSEJToj nun estas REJM, tamen en ĝia organizado partoprenas multaj kluboj kaj aktivuloj de E-movado.*

Sekva OkSEJT okazos en Uljanovsk, meze de aŭgusto 2001. Neniam antaŭe nia urbo gastigis tiun tendaron, do nia klubo kune kun aliaj organizantoj jam nun kompilas la programon, distribuas taskojn, invitas eksterlandajn gastojn. Ni strebas fari la tendaron vere interesa, internacia kaj neforgesebla.

> ***Uljanovsk*** *situas surborde de la rivero Volga, je distanco 900 km de Moskvo. Dum diurno veturas kelkaj trajnoj de Moskvo, la plej rapidaj kovras tiun distancon dum 15-16 horoj. En la urbo estas multaj vidindaĵoj – muzeoj, parkoj, belaj lokoj ktp.*

Ni jam trovis taŭgan bazejon, kiu situas 20 km for de Uljanovsk. Ĝi estas unu el la plej bonaj infanaj tendarejoj de nia regiono. Brikaj domoj, ĉambroj de du tipoj: 3-4-litaj – por tiuj, kiuj ŝatas komforton, kaj 20-lokaj – por tiuj, kiuj preferas loĝi amase. Dezirantoj loĝi en tendoj povos starigi ilin en la teritorio de la bazejo. De mateno ĝis vespero funkcios duŝejo. Koncerne la prezojn eblas jam nun diri, ke ili estos malpli altaj ol dum lastaj tendaroj.

Varia sporta programo pasos en la stadiono, kiu havas basketbalan, volejbalan placetojn kaj futbalan kampon. En la bazejo estas tenistabloj kaj baseno. Dum la tendaro okazos Olimpiko. En la tendarejo estas granda infana placeto, kun multaj balanciloj, skulptaĵetoj, granda rakedo ktp. Estas planata riĉa infana programo, pri kiu okupiĝos specialaj homoj. Do, oni povos veni tutfamilie kaj ne zorgi plentempe pri la infanoj, sed dediĉi sin al la tendara programo.

Kaj ĝuste tio – temo kaj programo de la tendaro estos la plej interesa kaj alloga specifaĵo de venonta OkSEJT. Tamen... ĉi-foje loko finiĝas, do pri tio mi rakontu en la sekva numero.

La 21 – 28-an de julio 2001 okazos 86-a Universala Kongreso de Esperanto en Zagrebo, ĉefurbo de Kroatio. Por aliĝi al la Kongreso sufiĉas pagi aliĝkotizon kaj informi pri vi laŭ demandaro: familia nomo; sekso; personaj nomoj; uea-kodo (se estas); adreso (ruslingve sed per latinaj literoj); telefonnumero; profesio; naskiĝdato. La informon kaj la kotizon sendu al la peranto de la Universala Kongreso ***Mikaelo Ĉertilov, a/k 21 RU-143006 Moskva-Odincovo-6***, laŭ aktuala kurzo de la Centrobanko. Eblas ĝiri per banko, la donitaĵojn petu aparte.

REK-EoLA: kio nova?

Ĉiuj vi kun la pasinta numero de REGo ricevis la unuan Informleteron pri REK-20 kaj EoLA-13, okazontaj en marto 2001 apud St.Peterburgo. La informilo enhavis la kondiĉojn kaj proksimumajn kotizojn. Necesas nur precizigi ke la tuta periodo de ambaŭ aranĝoj estas 7 tagoj – de la tagmezo 04.03 ĝis la tagmezo 11.03; tio signifas ke por ricevi la partoprenkoston sen manĝoj necesas de la tuta kosto subtrahi 7x70=490 rubloj.

En la januaro, post la subskribo de la kontrakto kun bazejo estos preparita la dua Informletero, kiu enhavos jam precizajn partoprenkostojn, provizorajn programojn de la aranĝoj kaj priskribon de la vojo al la bazejo. Se vi volas certe ricevi la duan informilon bonvolu ne forgesi aliĝi al REK-EoLA (por plena periodo aŭ partatempe). Ĝustatempa aliĝo garantios al vi la lokon en la loĝejo kaj la manĝojn en la manĝejo, kaj samtempe helpos al la organizantoj pli bone plani la aranĝojn. Por aliĝi al REK-EoLA necesas nur sendi la aliĝilon al: ***Ksenija Koĵevnikova, p/k 28, 195274 St.Peterburgo, Rusio*** aŭ plenigi la aliĝilon en la retpaĝo de la aranĝo ***<www.esperanto.spb.ru/rek-eola.htm>.*** *(La Organiza Komitato)*



Nastja Koĵevnikova (maldekstre), la prezidanto de OK de REK-EoLA kaj ŝia fratino Ksenja, la membro de OK (ne timu, ili estas ne malantaŭ prizona krado, sed malantaŭ la senvitra pordo)

Organiza Komitato invitas vin partopreni en la Unua Tendaro de Ukrainia Junularo Esperantista – TUJE-1. Bedaŭrinde post disfalo de Soveta Unio grave falis ĝenerala E-movado en Ukrainujo kaj precipe la junulara. Ni alvokas vin subteni la aranĝon! Al la interesitoj estos sendita la unua Informbulteno. ***Mikaelo Lineckij, (Minskoe ŝosse 10 – 55, 04201 Kievo, Ukrainio; <lineckij@ukrpost.net>)***

SE VI NE VENOS AL REK-EOLA
DUM TUTA JARO VI RESTOS SOLA

Ĉu vi ne forgesis, kio estas BET?

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni en ĉiujaraj tradiciaj la 37-aj Baltiaj Esperanto Tagoj (BET-37). BET-37 okazos de la 7 ĝis la15-a de julio 2001 en universitata urbeto de Litovia Agrikultura Universitato kelkajn kilometrojn for de Kaunas. Por dispono de esperantistoj estos tuta urbeto kun salonoj, aŭditorioj, studenta komunloĝejo, hoteleto, manĝejo, librovendejo, biblioteko, banejo, sporta centro, medicina centro, banko, poŝtejo, vendejoj, apoteko, frizejo, lavejo, kafejoj, stadiono kaj aliaj bezonataj aferoj. Eblos uzi universitatajn busojn, komputilojn k.s. En la programo: somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, pupteatra spektaklo, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, primovada lernejo, fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj al Kaunas kaj aliaj apudaj vidindaĵoj, ripozado en naturo, forumoj, libroservo, interkona vespero, baza konatiĝo kun la litova lingvo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, adiaŭa vespero. Esperantistoj el Rusio helpe de LEA povas ricevi vizojn senpage. Post BET-37 LEA kaj turisma firmao “BONVOJE” organizos grandan busan karavanon al UK. Aliĝiloj kaj detalaj informoj riceveblas ĉe Litova Esperanto-Asocio: ***p.k. 167, LT-3000 Kaunas, Litovio;*** telefonnumero 370-7-208503, retadreso: <ritavalc@takas.lt>, telefakso: 370-7-228616. *(Organiza komitato)*

25-jara jubileo de la Krasnojarska klubo

Sergej Bronov (Krasnojarsk)

Historio de Krasnojarska esperantista klubo

De 1974 ĝis 1975 daŭris prepara "universitata periodo", kiam aperis la kolektivo, iĝinta poste la Klubo. En 1974 en la klubo de la internacia amikeco ĉe la Krasnojarska ŝtata universitato aperis nova Esperanto-sekcio sub gvidado de V.Sapoĵnikov. En ĝi partoprenis plejparte la estontaj biologoj kaj kemiistoj – Irina Stepanova (nun Ĵuravljova), Olga Semjonova, Vera Lisenko (nun Riĵkova), Galina Peŝkova, Nadeĵda Sutugina, Jelena Bloĥina kaj aliaj. Multe helpis krasnojarska esperantisto de la antaŭa generacio – Pjotr Agapov.

Serĉante pluajn eblecojn de agado, V.Sapoĵnikov venis al la urba komitato de komsomolo, kie estis farita la historia decido. La 24-an de novembro 1975 naskiĝis Krasnojarska urba esperantista klubo. Ĝi estis fondita sur la bazo de la urba Palaco de kulturo laŭ decido de la krasnojarska urba komitato de komsomolo. La iniciatinto kaj la unua prezidanto de la Klubo estis Vladimir Sapoĵnikov – tiam studento de la biologia fakultato de la Krasnojarska ŝtata universitato. Ekde novembro 1975 ĝis 1987 daŭris "palaca" periodo de la organizo kaj prospero de la Klubo. La Klubo estis bone akceptita en la kulturpalaco, ties direktoro T.J.Sjurbak disponigis por kunvenoj de la Klubo la konstantan ejon, post ioma tempo aperis la telefono, krom tio por la instruado estis okupataj la ĉambroj en la tria etaĝo.

La unua klubanaro konsistis el la membroj de la universitata rondeto. En tiu tempo en Krasnojarsk estis kelkaj personoj, finintaj la korespondan E-kurson de B.Kolker, kiu sciigis pri ili V.Sapoĵnikov'on. Ili estis invititaj kaj en januaro 1975 en la Klubo aperis Irina Taskina, Aleksandr Urdaev kaj Sergej Bronov. Preskaŭ ĉiuj membroj de la Klubo estis junaj – antaŭ 25 jaroj. En tiu tempo la Klubo plene uzis materialajn eblojn de siaj patronoj – de la kulturpalaco kaj de komsomolo. Krom disponigo de la ejoj, meblaro, telefono la patronoj pripagadis eldonadon de propagandaj folietoj, multobligon de lernolibroj, oficvojaĝojn al E-renkontiĝoj, organizon de E-aranĝoj en Krasnojarsk.



torto por la jubileo

Financa bonstato de la Klubo baziĝis sur la paga koresponda instruado, pri kio okupiĝis Marina Jepina kun Larisa Ĥoĥlova, Irina Ĵuravljova kaj Jelena Jerŝova. La koresponda kurso estis organizita laŭ modelo de tiu de B.Kolker, kiu permesis multobligi por ĝi sian lernolibron. Multe helpis en tiu laboro Jelena Gorbatenko (nun Ŝevĉenko), tiama juna membro de la Klubo. Kontraŭ mono, ricevita pro koresponda E-kurso, estis aĉetitaj la bonkvalitaj magnetofonoj, gitaroj, 3 tajpiloj, libroj por la biblioteko, samovaro, fotilaro, eĉ la amatora radioricevilo – kaj en la kulturpalaco oficiale aperis la amatora radiostacio.

E-kursoj en la kulturpalaco iĝis amasaj – iutempe ilin finadis po 100 personoj jare.

Kutime ili funkciis dufoje dum jaro – printempe kaj aŭtune kaj instruperiodo daŭris tri monatojn. La Klubo havis tiam ĉirkaŭ 30-40 aktivajn membrojn. Tuj post finiĝo de la vica kurso la nombro atingadis 70-80, sed poste denove malgrandiĝis ĝis la mezaj ciferoj 30-40. La Klubo organizis kvin OrSEJTojn – en 1979 (170 partoprenantoj), 1980 (211 p.), 1984 (250 p.), 1987 (mankas informo), 1994 (139 p.). La unuaj kvar renkontiĝoj okazis sur la bordo de la artefarita "Krasnojarska maro" apud la fama hidroelektrostacio en la ripozloko "Parus". La lasta, kvina renkontiĝo okazis sur la bazo de la sanatorio "Rojev ruĉej" apud la fama naturrezervejo "Stolbi". Krom tio ofte estis aranĝitaj lokaj E-renkontiĝoj de siberiaj esperantistoj.

En 1981 por unuigi la esperantistojn finintajn la krasnojarskan korespondan E-kurson, estis fondita Krasnojarska Teritoria Esperantista Societo, kiu formale iĝis la plej ĉefa E-instanco en la Krasnojarska teritorio. Ĝin fondis la teritoria komitato de komsomolo. Por la Societo speciale estis disponigita ejo en la teritoria Domo de junularo, kiu (la Domo) apartenis al komsomolo. V.Sapoĵnikov ekgvidis la Societon (restante samtempe prezidanto de la Klubo) kaj komencis labori en la Domo de junularo kiel funkciulo. Li respondecis ne nur pri Esperanto, sed plejparte pri ĝi. Poste same eklaboris Marina Jepina. Tiuj du estis la unuaj salajrataj esperantistoj-oficistoj en Krasnojarsk. En tiu ĉi periodo la movado en Krasnojarsk fakte disdiviĝis je du partoj – la Klubo kaj la Societo. La Klubo restis urba kaj la klubanaro okupiĝis precipe pri la interna vivo. La Societo iĝis teritoria kaj dediĉis sin al la pure organiza laboro. Tiu provo etendi la agadon sur la spacon de la tuta Krasnojarska teritorio estis parte sukcesa. Unue, aperis novaj grupoj en Ŝaripovo, Divnogorsk, Minusinsk, Norilsk kaj aliaj lokoj. Due, okazis kelkaj teritoriaj aranĝoj, unuopaj esperantistoj en malproksimaj lokoj eksentis sian unuecon kun la granda socia movado. Sed, bedaŭrinde, ne estis atingitaj seriozaj celoj, metitaj dum la fondo de la Societo: iĝi serioza multmembra organizaĵo kun la firma financa stato, salajrataj oficistoj, vasta reto de lokaj E-organizaĵoj.



La Societo devis ĉion por la agado ricevadi de sia patrono komsomolo, sed en la mezo de la 80-aj jaroj la situacio en komsomolo ŝanĝiĝis, komsomolanoj ekokupiĝis pri entreprenado kaj ideologia laboro jam ne estis bezonata, sed Esperanto antaŭe estis reprezentata ĝuste kiel parto de ideologia laboro. Evidentiĝis ke la Societo nenion povis doni al la Klubo, sed multe postulis – monon, homojn, tempon. La iam floranta Societo ekvelkis. La sorto de la Societo ŝajnis decidita, sed en la Klubo oni ne perdis vane la tempon. Tiama prezidanto Aleksej Ĵuravljov post interkonsento kun la aktivularo ekagis direkte al plia memstareco de la Klubo. Unue temis pri la klubejo. Tiam ne estis minacoj por ekzisto de la Klubo en la Kulturpalaco, do iuj klubanoj opiniis tion vana afero. Sed rezultoj de tiu ĉi preventa paŝo montris sin post 5 jaroj, kiam venis ekonomia kaj politika krizo.

Dum la periodo 1987-1992 la Klubo ekhavis apartan klubejon, bankan konton, propran

telefonon. Oni elektis klubejon en subtera etaĝo de loĝdomo, kie iam troviĝis bombrifuĝejo. Pro sia destino la nova ejo estis iom ekipita per akvokonduka, elektra kaj hejta sistemoj. Sed ili estis ne finmuntitaj kaj ne funkciis. Krome, la planko estis grunda kun flakoj kaj rubaĵo, la muroj kaj plafono ne estis prilaboritaj, forestis pordoj inter ĉambroj. Do, la Klubo ricevis nur spacon, kiun estis necese transformi en la klubejon. La tutan laboron faris la klubanaro. Iuj komence ne kredis, ke io povas rezultiĝi. Ĉi-okaze multe signifis la persona pozicio, volo kaj laboremo de la prezidanto Aleksej Ĵuravljov. Certe, ankaŭ aliaj aktivuloj multon faris. En tiu momento lukto por aparta ejo ŝajnis superflua, sed en 1992 dum la ĝenerala ŝtata, politika kaj ekonomia krizo evidentiĝis, ke nur dank' al tio la Klubo ne sekvis la sorton de multaj aliaj E-kluboj, pereintaj post kiam ili iĝis nenecesaj por siaj patronoj.

Post riparo de la ejo kaj translokiĝo de la Klubo la situacio multe pliboniĝis. La klubanoj ĝuis la sendependecon kaj multe aktivis. Daŭris instruado de Esperanto en elementaj kursoj (en la propraj ejoj kaj en aliaj lokoj), Valerij Maliĥin laboris en la Palaco de pioniroj kiel instruisto-gvidanto de Esperanto por gejunuloj. Jelena Kareva organizis ion similan al la infan-vartejo por multnombriĝintaj infanoj de la klubanoj kaj speciale por tio estis ekipita unu el klubaj ĉambroj – infanejo. La Klubo restis sufiĉe multnombra: ĉirkaŭ la Klubo grupiĝis preskaŭ 50 personoj. La Klubo estis kolektiva membro de la tutsovetiaj (kaj poste tutrusiaj) E-organizaĵoj: ASE, SEU, REU, SEJM-2.



Trankvileco de la kluba vivo daŭris ĝis 1992, kiam komenciĝis ekonomia kaj politika reformo en Rusio. Bedaŭrinde en tiu tempo multaj aktivuloj embarasiĝis, ne sciis kion fari, komencis okupiĝi pri siaj propraj aferoj kaj forlasis Esperanton. Sed la pli frue ricevita sendependeco savis la Klubon. Certe, iom malaktiviĝis la klubanaro, preskaŭ ne funkciis E-kursoj, nemultaj klubanoj vizitadis E-renkontiĝojn, sed restis la loko, kiun neniu povis forpreni de la Klubo, do restis la Klubo mem. Sed tiu trankvileco ne povis longe daŭri. Jam aperis novaj leĝoj pri sociaj organizaĵoj, el la oficialaj instancoj forpasadis personoj, kiuj iam helpadis al la Klubo, la mono mankis.

En la mezo 1992 post la 10-jara foresto en la Klubon revenis Sergej Bronov, iama respondeca sekretario de la Klubo. Li proponis programon, kies bazo estis: reformi la Klubon al serioza, jure plenrajta, sendependa kaj ekonomie memstara organizaĵo. S.Bronov preparis la novan statuton de la Klubo, konvenajn porregistrajn dokumentojn kaj la 10-an de junio 1992 la Kluba Ĝenerala kunveno aprobis ilin. Samtempe estis elektita nova estraro kaj S.Bronov ekestis prezidanto. Jam la 29-an de junio 1992 la Klubo ricevis en la Estrarejo de justico ĉe la Administracio de Krasnojarska teritorio ateston pri la reregistriĝo.

Krasnojarska Esperantista Klubo trapaŝis longan vojon. Ĝi sukcese uzis specifikecon de ĉiu travivata periodo, ĝustatempe adaptante sin al aktualaj kondiĉoj. Eblas indiki principojn de la Kluba vivo, dank' al kiuj la Krasnojarska klubo tiom sukcesis:

- baza celo – serioza organizaĵo kun ĉiuj "formalaĵoj" kaj ĉiutaga profesia laboro;
- en konstanta disputo "kio estas klubo – ĉu klub-ejo, ĉu klub-anaro" necesas preferi klubejon (anaro ĉiam troviĝos);
- laboro sindona kaj oferema – ĉion por la Klubo, nenion (materialan) el la Klubo;
- kluba patriotismo, sankta rilato al Esperanto kaj la Klubo;
- reciproka interhelpado, amikeco kaj postulemo.

(Tiu ĉi artikolo estas prenita kun la permeso de la aŭtoro el "Libro por tendarano", eldonita en 1994 por OrSEJT-31).

Alla Jaĥina (Krasnojarsk)

Notoj sur buŝtuko

La 25-an de novembro okazis grandioza evento (por kiu kolektiĝis 55 personoj) – krasnojarskaj esperantistoj festis 25-jariĝon de la urba Esperanto-klubo, kiu, eble pro sia kaŝita lokiĝo (en la bombrifuĝejo) aŭ pro firmaj siberiaj karakteroj de siaj adorantoj, travivis tiom da jaroj kaj sukcesis ne perei, elteni diversajn reĝimojn kaj statojn de nia ŝtato kaj de niaj esperantistoj.

La Klubo mem por sia naskiĝdato ricevis donacon – novan freŝbakitan reklamŝildon, kiu pendas ĉe angulo de la domo, kie troviĝas la klubejo, kaj montras veran vojon. La esperantistoj ricevis renkontiĝon kun siaj delongaj kaj ĵusprezentitaj amikoj, amason da tortoj kaj tostoj. Kiel kutime, neniu rusa festo pasas sen komuna kantado, kiun gvidis Sergej Miĥajlin kaj Jelena Zaznobina. Estis ankaŭ elpaŝoj "solo" – de fama kantisto Sergej Bozin kaj ne tiom fama, sed same esprimplena Vlad Ŝĉebenjkov. Sergej Miĥajlin kelkfoje dum la vespero provis kanti sian faman kanton "Kio do la am'", sed ne sukcesis plene rememori la vortojn, krom la unuaj strofoj; lian kanton finfine bele plenumis du teneraj voĉoj de Evelina Sokolova kaj Olga Bozina, kiuj ĝojigis la publikon ankaŭ per aliaj amataj kantoj.



La feston daŭrigis la ludo "Ho, feliĉulo!" (en Esperanto), ludis kaj novicoj kaj jam spertuloj, laŭde al niaj esperantistoj neniu demando restis sen respondo, des pli korekta respondo. Poste restis la plej persistaj por ludi plue diversajn ŝatatajn ludojn kaj ili tiom persistis ke eĉ venis sekvonttage al la klubejo por daŭrigi la ludojn, kaj ne la lasta kialo estis dolĉaj bongustaĵoj, restintaj de la festo.

Nia Klubo ricevis multege da gratuloj, inkluzive la plej gravajn por ni – de UEA kaj REU, kaj ne malpli agrablajn por ni – de niaj geamikoj el la tuta mondo – de JETI (Junulara Esperanta teamo de Ivanovo), Vladivostoka E-klubo, E-klubo Erlangen (Germanio), E-Societo de Sacramento (Usono), Societo pro Esperanto (Finnlando), Nagoja E-centro (Japanio), Pierre Berlot (Francio), Nikolaj Stepanov (Moskvo), Valentin Melnikov

(Moskvo), Miko Sloper (Usono), Giovanni Grossi (Italio) kaj multaj aliaj el Rusio, Belgio, Bulgario, Brazilo, Urugvajo, Venezuelo.

Mi pardonpetas se mi ne menciis ĉiujn, ĉar eble iliaj gratuloj dume ne atingis nian Klubon. Koran dankon al ĉiuj, kiuj kun ni ĝojas pro la ekzisto de nia Klubo kaj deziras al ĝi longan vivon!

(vidu aliajn fotojn sur la dua kovrilpaĝo)

Irina Gonĉarova (Odincovo)

Ĉarmo de provinco, aŭ Nova junulara E-klubo en Roslavl

Ĉu vere, aŭ nur ŝajnas, ke en fora provinco gejunuloj estas pli entuziasmaj kaj kredemaj, pli aspirantaj al disvastigo de sia privata mondeto kaj strebantaj al glorigo de sia nask-urbo per propra agado, ol en mal-provinco? Aŭ Roslavl estas iu speciala okazo? Tamen, sendube, jes, speciala... Ja ne al ĉiu provinca urbeto venas prezidanto de Akademio Internacia de la Sciencoj (AIS), germana profesoro d-ro Helmar Frank kun sia esperantlingva kursaro pri kibernetiko – kaj anticipa 12-hora rektmetoda E-kurso. Ja ne en ĉiu provinca urbeto estas filio de la Moskva Ŝtata Industria Universitato (MGIU), kie Esperanto estas por kelkaj studentaj grupoj deviga studobjekto. Ja ne en ĉiu el multnombraj provincaj MGIU-filioj estas direktoro kun tioma strebo doni al siaj studentoj metropolajn eblecojn por studado kaj ŝancojn por kariera, kultura kaj persona evoluo, kiel la direktoro de RF MGIU s-ro A.M.Stukalin. Ja ne apud ĉiu direktoro estas la instruistino pri matematiko, aspirantino de MGIU Natalja Maksimova – estinta komsomola aktivulino de KID (Klubo de Internacia Amikeco), kiu tuj kaptis la ideon de Esperanto kaj fervore ekplenumadis la ordonon de la direktoro okupiĝi pri E-klubo en la RF MGIU. Kaj, fine, ja ne al ĉiu provinca urbeto iras por instrui kaj popularigi E-on kaj E-movadon Irina Gonĉarova.

> Laŭ hazardo, venas al la Paradiza Pordo samtempe pastro kaj buskondukisto. Dio akceptas ilin kaj kontrolas iliajn vivdosierojn. Li turniĝas al la buskondukisto: “Mi bonvenigas vin en Paradizon. Ĉu vi vidas la belegan domon tie, sur la supra nubo? Ĝi havas varmigitan naĝbasenon, tenisludejon, ktp., alivorte ĉiun luksegon. Tie vi pasigos Eternon.”
> Tiam Li turniĝas al la pastro: “Ĉu vi vidas la ruldometon tie, sur la suba nubo? En ĝi estas nenio. Tie vi pasigos la ceteron de via mizera ekzisto.” La pastro ekkoleras, kaj diras al Dio: “Kial do al mi, pastro de Via Eklezio, Vi donas nur aĉan ruldometon, dum Vi donas al tiu simpla buskondukisto luksegan vilaon!?” “Estas tre simple,” respondas Dio. “Kiam vi predikis dum la Meso, la homoj dormis, dum kiam li stiris sian buson, la homoj preĝis!” *(esperanto-anekdot)*

Jes, estas mi, al kiu bonŝancis salajrate labori en tiuj kondiĉoj. La RF-direktoro, esperante pri nova vizito de d-ro Frank, invitis min instrui E-on dum 26 horoj por dezirantaj studentoj. Parto de ili ankoraŭ konservis la entuziasmon de la unua nia vizito, aliaj estis inspiritaj de la unuaj, kelkaj venis pro siaj propraj motivoj. Rezultiĝis proksimume 20-homa grupo el diversaĝaj kaj diversfakaj gestudentoj, kun iom diversa esperantlingva bazo. Ni laboris po 4-5 horoj ĉiutage, de lundo ĝis vendredo, uzante la instruan romaneton “Gerda malaperis” de Claude Piron kaj laborante laŭ mia baza paroliga kurso “Faru la rondon!” – de kiu ni realigis 4 lecionojn el 10. Tio sufiĉis por interkonatigi la gejunulojn kaj elvoki intereson daŭrigi la studadon. Do, kreiĝis realaj kondiĉoj por fondi E-klubon.

Verdire, la unuajn semojn de la klubo mi dissemadis en la fekundan grundon, preparitan de d-ro Frank, aprile 2000. Fakte tuj post tiu nia vizito (nian grupon tiam bele kompletigis Katja Bebenina, mia eksa studentino kaj aktivulino de MASI, nun aspiranto de MGIU) la roslavla junulara E-klubo jam surpapere aperis kaj eĉ kunvenis kelkfoje. Tamen tute evidente, ke, forŝiritaj de la movado kaj sciante preskaŭ nenion pri ĝi, la gestudentoj ne imagis, kion fari en la klubo... Tial dum ĉi-foja vizito ni decidis komenci ĉion kvazaŭ de nulo. Bonŝance, ĵus pasis StRIGo-6 kun la precize konvena temo: "Kluba vivo: traspertu kaj surpriziĝu!". Kaj hazarde kun mi evidentiĝis esti skizoj de miaj metodikaj konsiloj pri tio, kiel krei E-klubojn. Do, sabate mi invitis ĉiujn dezirantajn kursanojn al mia hotelĉambro por labori pri la klubo kaj anonci ĝin naskita. Venis 15 homoj. Kaj ni okazigis la kunvenon precize laŭ la StRIGa modelo. Kaj la klubo vere naskiĝis. La 25-an de novembro. Bonvolu memorfiksi la daton. Eble post ioma tempopaso vi deziros gratuli la klubon okaze de la unujariĝo – kaj bondeziri al ĝi plian prosperon. Sed, eble, ĉio forvaporiĝos senspure, malgraŭ la specialaj kondiĉoj... De kio dependas kluba estonteco? Ĉu ne de konstanta patronado de iu kompetenta kaj sufiĉe idealisma-entuziasma eksterkluba persono? Kiam lastfoje ni havis similan sperton? Eble, reprovi?…

Kontaktiloj de la roslavla junulara E-klubo NEON: Vitalij Sidorov, la kunordiganto: <reez@zci.smolensk.ru> (dlja Vitalija Sidorova); Jelena Nikolaeva (ĉefa lingva konsilanto): str.Respublikanskaja 12 – 7, RU-216500 Roslavl, Smolenskaja obl.

Garik Kokolija (Moskvo)

Nabereĵnie Ĉelni – ĉu nova E-ĉefurbo de Tatarstano?



teumado en la direktora kabineto; de maldekstre: Nataŝa Koreneva, Oleg Demjaŝev, Aljona Vasiljeva, Anatolij Ivanoviĉ Bloŝĉinskij, Garik Kokolija, Raisa Petrovna Anisimova

La historio de nuntempa E-movado en la urbo Nabereĵnie Ĉelni aspektas proksimume jene. La unua, plej verŝajne, estis Aljona Anisimova, kiu ellernis la lingvon dum sia studado en Kazanj, jam en la 1993 jaro partoprenis en OkSEJT apud Smolensk kaj iom poste instruis Esperanton al sia fratino Nataŝa. Poste al la urbo transloĝiĝis el Tomsk Tatjana Sungatullina, ŝi eklaboris en mezlernejo kaj, nenion sciante pri la aliaj, komencis instrui la lingvon al la lernantoj. Post kelka tempo ŝi trovis en loka gazeto la anoncon pri lanĉo de E-kurso. Telefoninte al la indikita numero ŝi trovis Oleg Demjaŝev, kiu ellernis Esperanton memstare kaj, same nenion sciante pri Tatjana nek pri Aljona kun Nataŝa, decidis fondi en Nabereĵnie Ĉelni la kurson kaj, poste, la klubon. Rezulte de tio naskiĝis la klubo, kiu nun nomiĝas "Gaja krokodilo". En 1998 Oleg venis al OkSEJT en Ĉeboksari kaj klopodis inviti al sia urbo E-aranĝojn. Dank' al lia laboro kaj aktivado de instruitaj de li gejunuloj en Nabereĵnie Ĉelni

okazis unue la renkontiĝo VER printempe de 1999 kaj poste – EoLA printempe de 2000; nun ili strebas ricevi la rajton okazigi ĉe si OkSEJTon.

Intertempe en Nabereĵnie Ĉelni aperis alia centro de E-aktivado. Raisa Petrovna Anisimova, la patrino de Aljona kaj Nataŝa, rakontis pri Esperanto al la direktoro de profesia lernejo ("Экономико-строительный колледж"), en kiu ŝi laboras. Subite la direktoro, Anatolij Ivanoviĉ Bloŝĉinskij entuziasmiĝis pri la lingvo; rezulte ekde la fino de la 1999-a jaro Esperanto estas unu el tri fremdaj lingvoj (kune kun la angla kaj germana), el kiuj la studantoj de 2-a kaj 3-a kursoj de tiu lernejo elektas unu devigan por sia studado.

Kaj nun la bildo de la movado en Nabereĵnie Ĉelni aspektas tre impone. Tatjana Sungatullina instruas Esperanton al siaj lernejanoj. La klubo "Gaja krokodilo" regule kolektiĝas kaj nun prepariĝas al la partopreno en REK-EoLA, ĉar multaj ĝiaj membroj bone kantas kaj gitarludas; la plej rimarkinda el ili estas Nataŝa Koreneva, kiu meritis unu el ĉefaj premioj en kanta konkurso dum lasta EoLA. En la profesia lernejo, estrata de Anatolij Ivanoviĉ, laboras du E-instruistinoj – Nataŝa Anisimova kaj Nataŝa Nazariĉeva. Krom la devigaj lecionoj ili gvidas ankaŭ E-kurson por la dezirantoj (kiuj devige lernas la anglan aŭ la germanan), tiun kurson vizitas ĉ.30 studentoj. En la lernejo ekde pasinta jaro funkcias E-klubo "Salamandro", kiu per sia agado ekas bonan konkuradon kun "Gaja krokodilo". En la urba televido jam dufoje estis kelkminutaj elsendoj pri la esperantistoj. En Nabereĵnie Ĉelni estas eĉ E-familio: ĝin kreis Asĥat Ŝireev kaj Gulnara Saliĥova (jam Ŝireeva); ĉi-jare en tiu ĉarma familio jam naskiĝis nova esperantisto.

Se konsideri nunan ne tre viglan staton de E-movado en Kazanj, respondo al la demando, per kiu estas titolita tiu ĉi artikolo, ŝajnas esti jesa!

(vidu aliajn fotojn sur la dua kovrilpaĝo)

Vladimir Bespalov(Soĉi)

Ago-Tago en Soĉi

La 15-an de oktobro en Soĉi E-klubo "LARO" organizis enmanigon de diplomoj kaj donacoj al infanoj, kiuj partoprenis en la internacia Konkurso de Infan-desegnaĵoj en Francio. Entute estis 12 premioj, el kiuj 8 ricevis soĉi-aj infanoj. El la 193 bildoj ricevitaj por la konkurso de 11 lernejoj el 6 eŭropaj landoj 90 estis senditaj el soĉi-aj lernejoj: 3 art-lernejoj kaj 3 ordinaraj. La ceremonio okazis en la urba Kultur-domo de artoj (sidejo de E-klubo "Laro"; Soĉi, str.Gorkogo 85 – adreso por gratuloj kaj laŭdoj al la direktoro). La klubo preparis koncerton. Apartajn laŭdojn mi volas direkti al la animo de nia E-klubo Natalja Olejnikova, kiu profesie ĉion aranĝis, kaj aktivigis klubanojn kaj lernejanojn. Nia bardo, komponisto kaj plenumanto de siaj E-kantoj Sergej Sergeev efike prezentis kvodlibeton de E-kantoj, kiun li speciale kompilis por la aranĝo. Multe helpis gvidi la koncerton du fratinoj Jana kaj Ira Kizenko, du ĉarmaj lernantinoj. Ankaŭ interesajn programerojn preparis nia ŝatata ŝercistino kaj amatora aktorino Tamara Petrovna Kovalenko, kiu allogis al la plenumado grupon da gelernantoj. Sed juvelo de la programo certe estis parolo de Jelena Ŝevĉenko, kiu en la nomo de REU gratulis la gajnintojn kaj diplomitojn kaj deziris al ili pluajn sukcesojn en ilia lernado kaj uzo de Esperanto en internaciaj rilatoj. En fino de la programo ĉiuj infanoj, iliaj gepatroj kaj instruistinoj kaj ankaŭ la klubanoj de E-klubo "LARO" tradicie ricevis glaciaĵojn. Ĉiuj estis tre kontentaj.

Bulteno de REU

43 dumvivaj membroj de REU:

Abolskaja Marija (St.Peterburgo), Aĥmet Gulnara (Karaganda), Andrjuŝkin Igorj (Moskvo), Aroloviĉ Viktor (Moskvo), Berdiŝev Viljam (Moskvo), Ciganov Oleg (Leningrada reg.), Cvetkova Valerija (St.Peterburgo), Ĉerenkova Larisa (Rjazana reg.), Ĉertilov Miĥail (Odincovo), Gluĥov Aleksandr (Kaliningrad), Gluŝik Vladimir (Ukrainio), Gnedaŝ Nikolaj (Krasnodara reg.), Gonĉarova Irina (Odincovo), Grigorenko Vasilij (Ukrainio), Griŝin Nikolaj (Latvio), Gudskov Nikolaj (Moskvo), Jakimĉuk Natalja (Ukrainio), Jakovlev Jurij (Pskova reg.), Ĵuravljov Aleksej (Krasnojarsk), Karcev Jurij (Uljanovsk), Kauc Valdemar (Estonio), Kolganov Andrej (Usono), Kozin Igorj (Vologda), Kurolap Zinovij (Kanado), Kuznecov Sergej (Moskvo), Laskina Marina (Tula reg.), Lipec Vladimir (Moskvo), Medvedev Lev (Moskvo), Melnikov Valentin (Moskvo), Miĥajlov Nikolaj (Leningrada reg.), Petrov Nikolaj (Leningrada reg.), Pogorelaja Svetlana (Ukrainio), Popova Larisa (Bugulma), Roganova Rimma (Perma reg.), Salomatov Aleksej (Moskvo), Sapoĵnikov Aleksandr (Ivanova reg.), Seguru Valentin (Moskvo), Sidorov Anatolij (Siktivkar), Ŝapoŝnikova Larisa (Arĥangelsk), Tujakin Georgij (Moskvo), Voloŝin Vjaĉeslav (Ulan-Ude), Vulfoviĉ Lev (Germanio), Zozulja Boris (Rostov-na-Donu).

La membroj de REU, kiuj jam kotizis por la jaro 2001:

Aristova Jelena (Moskvo), Bondarj Aleksandr (Volĵskij), Borodin Aleksej (Krasnodara reg.), Bruĥis Pavel (Moskvo), Ĉernov Vladimir (Kaluga), Daŝevskij Leonid (Toljatti), Gazizi Gafur (Salavat), Gluĥov Gennadij (Jelec), Gonĉarov Anatolij (St.Peterburgo), Ilutoviĉ Klara (Moskva reg.), Kaĉalova Zoja (Tiĥvin), Kuznecov Oleg (Klin), Lebedev Vladimir (Gusj-Ĥrustaljnij), Perepelica Vladimir (Moskva reg.), Reŝetnikov Vladimir (Jekaterinburg), Strelec Sergej (Ĉeljabinsk), Ŝuvaev Timofej (Niĵnevartovsk), Tarĥan Ermita (Moskvo), Vajnapelj Jurij (Irkutsk), Volkov Pavel (Ivanovo).

N.B.: por fariĝi individua membro de REU por la jaro 2001 necesas: se vi loĝas en Rusio aŭ alia lando de KSŜ – sendi aŭ transdoni 60 rublojn al **Георгий Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 123310 Москва,** kaj se vi loĝas en alia lando – pagi 10 eŭrojn al la konto **reua-p** ĉe UEA. Farinte tion vi: a) morale kaj finance subtenos nian landan E-movadon; b) dum tuta jaro ricevados REGon kaj diversajn informojn de REU; c) rajtos havi la rabatojn ĉe partopreno en landaj E-aranĝoj kaj ĉe la uzo de REU-servoj.

REU invitas siajn membrojn partopreni en la vica 18-a REU-konferenco, kiu okazos enkadre de la 20-a Rusia E-kongreso en marto 2001. Dum la konferenco vi povos pli detale ekscii pri la farita dum la jaro laboro, partopreni en la diskutoj pri estonta agado kaj en la elektoj de novaj gvidorganoj de la Unio.

REJM-info

La listo de aktualaj membroj de REJM:

Aĥmetgareeva Ruŝana (Kazanj), Alekseev Vladimir (Moskvo), Anisimova Natalja (Nabereĵnie Ĉelni), Arosev Grigorij (Moskvo), Baranov Miĥail (Ivanovo), Besĉastnov Aleksej (Moskvo), Borodin Aleksej (Krasnodara reg.), Bulganina Irina (Nabereĵnie Ĉelni), Burmisova Jekaterina (Ĉeboksari), Ĉerniŝova Olga (Moskvo), Dadaev Oĉjo (Moskvo), Degtjarev Vladimir (Kazanj), Demjaŝev Oleg (Nabereĵnie Ĉelni), Dmitrieva Elena (Nabereĵnie Ĉelni), Filippova Irina (Novoĉeboksarsk), Fridman Alla (Belorusio), Gonĉarov Anatolij (St.Peterburgo), Gonĉarova Irina (Odincovo), Gonĉarova Svetlana (Odincovo), Grigorjevskaja Natalja (Ivanovo), Hekland Bard (Norvegio), Ignatjeva Jekaterina (Ĉeboksari), Jevlampieva Jekaterina (Ĉeboksari), Kapitonov Danil (Ĉeboksari), Karcev Jurij (Uljanovsk), Koĉetkova Marija (Ivanovo), Koĵevnikova Anastasija (St.Peterburgo), Koĵevnikova Ksenija (St.Peterburgo), Koreneva Natalja (Nabereĵnie Ĉelni), Kudrjaŝova Alla (Moskvo), Makarova Tatjana (Novoĉeboksarsk), Maleĵ Tatjana (Ivanovo), Malenko Vitalij (Ĵukovskij), Martinŝ Antonio (Portugalio), Maslova Jelena (Uljanovsk), Miĥajlova Polina (Volgograd), Nazariĉeva Natalja (Nabereĵnie Ĉelni), Nirab Kajastĥa (Ĉeboksari), Sabirov Aleksej (Permj), Sovina Aleksandra (Ĉeboksari), Stepanov Andrej (Ĉeboksari), Stepanova Irina (Ĉeboksari), Strojnov Jevgenij (Ivanovo), Sudakova Aleksandra (Dimitrovgrad), Ŝejnina Sofja (Ivanovo), Ŝireeva Gulnara (Nabereĵnie Ĉelni), Ŝlikanova Jevgenija (Ĉeboksari), Ŝmatkov Sergej (Ukrainio), Terjoĥina Marija (Uljanovsk), Tiĥonov Sergej (Novoĉeboksarsk), Torgunova Marina (Ivanovo), Turkina Julija (Ĉeboksari), Vasiljeva Olga (Ĉeboksari), Viĥrov Konstantin (Ĉeboksari)

ATS dum StRIGo: "Kluba vivo: traspertu kaj surpriziĝu"

REJM partoprenis en la programo de la 6a StRIGo (4-7 nov 2000, Ivanovo), kiun tradicie organizas MASI, per okazigo de aktivul-trejna seminario (ATS) enkadre de la renkontiĝo, kiu mem estis dediĉita al kluba vivo. Laŭ la koncepto ricevitaj dum ATS scioj kaj konoj devis esti tuj aplikataj en la praktiko. Tiucele estis kreitaj dumrenkontiĝaj kluboj, kiuj portis nomojn de la urboj, kie E-movado dume ne ekzistas – Tverj, Tula kaj Rjazanj. Fonditaj kluboj plenumis diverstipajn taskojn kaj rezultojn prezentis en formo de konkurso pri modela klubkunveno, farado de klubaj gazetoj, preparado de radioraportaĵo, KGS. Dum la aranĝo por tiesaj kluboj estis lanĉita REJMa interkluba konkurado, kaj la vere ekzistantaj kluboj jam ekis kolekti poentojn. Konkurado daŭros ĝis sekva StRIGo, dum kiu estos anoncitaj kaj premiitaj la gajnintoj. Pri kriterioj de la konkurado vi povas informiĝi ĉe REJM-komitatano Katja Ignatjeva <asocio@chuvsu.ru>. Kadre de teoria parto de ATS okazis prelegoj far

> La 17-an de novembro Junulara E-Teamo de Ivanovo JETI ekhavis novan ejon kaj novan, kaj samtempe la unuan, prezidanton: Sonja Ŝejnina. REJM kore gratulas kaj deziras sukcesan laboron al ŝi kaj ŝia "Teamo".

Irina Gonĉarova, Katja Ignatjeva, Andrej Grigorjevskij, Slavik Ivanov, Kostja Viĥrov, Pavel Volkov, Dima Ŝevĉenko. Jenas titoloj de kelkaj: principoj de organizado de kluboj, "brikoj" de kluba kunveno, Tago de libroj, Festivaloj – Lingva kaj de Interesoj, registriĝo de organizo, laboro kun amaskomunikiloj, ligoj kun E-organizoj ktp. Seminarion partoprenis gejunuloj el Moskvo, Ivanovo, Ĉeboksari, Nab.Ĉelni, Uljanovsk, Dimitrovgrad, St.Peterburgo, Niĵnij Novgorod, Kostroma, Lipeck. Al kelkaj aktivuloj REJM repagis la vojaĝkostojn. Espereble ATS "provokos" agojn kaj naskiĝon de novaj kluboj (aŭ ilian pliaktiviĝon). Almenaŭ en Ivanovo postsekvoj estas esperigaj: plivigliĝis la agado de Junulara E-klubo "Teamo"; sub gvido de Pavel Volkov okazis la organiza kunveno de IMEA (Ivanova Medicinista E-Asocio). Planatas eldono de la broŝureto rezulte de tiu ĉi Aktivul-Trejna Seminario kun aldona suplemento (ludoj kaj praktikaj konsiloj por krei grupdinamikon). Pliajn informojn petu de Natalja Grigorjevskaja, REJM-komitatano pri seminarioj kaj trejnadoj: ***153034 Ivanovo, ul.Smirnova, 87-16*** aŭ rete <grina@inbox.ru>.

Diskutlisto de REJM: ni invitas ĉiujn aliĝi al la diskutlisto <rejm@egroups.com> kie ni interŝanĝu novaĵojn pri ĉiuj okazintaĵoj ĉe niaj lokaj kluboj, kaj anoncu pri grandaj kaj malgrandaj eventoj, kaj donu konsilojn. Ne hezitu kontribui pri viaj spertoj, ideoj, proponoj kaj alio por prospero de la junulara movado en Rusio. Por aliĝi sendu malplenan mesaĝon al <rejm-subscribe@egroups.com>. Ĝis la renkontiĝo ĉe REJM-diskutlisto!

REJM intencas krei datumbazon de junaj rusiaj esperantistoj (kies aĝo estas malpli ol 30 jaroj) kaj petas vin (se vi estas en tiu aĝo) plenigi la aldonatan enketilon kaj sendi al Natalja Grigorjevskaja: ***153034 Ivanovo, ul.Smirnova, 87-16*** aŭ rete <espero@newmail.ru>.

HISTORIA PAĜO

Milan Sudec (Kroatio)

Miaj renkontiĝoj kun Nikolaj Ritjkov



N.Ritjkov (1913-1973) (la foto el la memorlibro pri li, kompilita de M.Abolskaja)

Inter la jaroj 1964 kaj 1966 mi laboris en la Centra Oficejo de UEA prizorgante la libroservon. Iutage venis en mian ĉambron d-ro Sadler, tiama redaktoro de "Esperanto", dirante: mi havas gravan novaĵon. Antaŭ mallonga tempo telefonis el Londono prezidanto de UEA Ivo Lapenna dirante, ke eminenta rusa aktoro kaj esperantisto Nikolaj Ritjkov vizitante Esperanto-aranĝon en Vieno, decidis resti en Okcidento. Laŭ invito de konata franca esperantisto Roger Bernard, Nikolaj estis lia gasto en Asnieres dum iom da tempo. Estraranoj de UEA klopodis trovi solvon pri estonteco de Nikolaj. Prezidanto Lapenna decidis ke Nikolaj venu al Centra Oficejo en Rotterdam, kie li povus eklabori. Ni, tiamaj oficistoj, senpacience kaj scivoleme atendis lian alvenon.

Direktorino de CO Marianne Vermaas prezentis al ni la novan rusan kolegon. Nikolaj entuziasme eklaboris plenumante diversajn taskojn, sed volonte li vagadis tra la ĉambroj

por iomete babili. Ne estas mirinde, ĉar aktoro ne povas esti ligita al skribotablo dum longa tempo. La libroservo situis en teretaĝo kie mi laboris, kaj Nikolaj ofte vizitis min dirante: "bratko", mi venis por iomete "inventuri" vian librostokon. Li estis vera libroamanto.

Iutage, kiam li vizitis min, mi demandis: Nikolaj, rakontu al mi kiel vi sukcesis fuĝi de via grupo en Vieno? La rakonto estas pli longa, – li diris, – kaj mi volas iri al komenco. Vi scias ke stalina "purigado" ne preteris ankaŭ esperantistojn. Ankaŭ mi estis sendita al Gulag por fosi la oron – kulpigita ke mi kiel esperantisto havis la kontakton kun eksterlando. Feliĉe venis amnestio kaj mi revenis denove al Moskvo. Profesie mi aktoris (rolante Lenin) kaj denove aktivis por Esperanto. Foje mi partoprenis en Esperanto-aranĝo en Bulgario, sed al Okcidento ankoraŭ mi ne povis veturi. En la 60-aj jaroj grupo da esperantistoj preparis sin por veturi al Vieno. Ankaŭ mi estis proponita, unue ĉar mi bone regis la germanan lingvon, kaj krome mi ricevis la taskon prispioni la prezidanton de UEA prof. Lapenna.

Nia grupo veturis aŭtobuse akompanata de respondeculo (komisaro). Mi jam antaŭe decidis resti en Okcidento. Lastan tagon diris nia gvidanto: metu viajn valizojn en la aŭtobuson, kaj ni havas ankoraŭ tempon por viziti grandmagazenon. Tuj mi faris la decidon – nun estas bona okazo por fuĝi. Sed, ho ve. Apud mi staris la gvidanto kaj diris al mi: Nikolaj, vi bone parolas la germanan, venu kun mi por traduki! En la momento mi estis ŝokita, sed tamen restis trankvila. Mi lasis la komisaron iri antaŭen, kaj mi en bona momento perdiĝis en amaso. Jen tiel mi fuĝis, diris Nikolaj.

La libroservo estis dividita de la kuirejo nur per la fenestro kaj oni povis enrigardi kaj babili. El oficistoj nur d-ro Sadler ofte kuiris – estis unu el liaj hobioj. Ankaŭ Nikolaj ĉiutage preparis sian tagmanĝon – plejofte ian kaĉon. Foje mi observis lin, kiam li finmanĝis, lekis la kuleron kaj metis ĝin en la poŝon. Mi tuj ekkriis: Nikolaj, kion vi faras? Konsternite li respondis – estis refleksa ago, de kiu mi ankoraŭ ne povas liberiĝi. En Gulag estis mia sola privataĵo!

Nikolaj ne estis longe en la Centra Oficejo. Londonaj esperantistoj trovis por li laboron ĉe brita radiostacio BBC. Tie li laboris por emisioj en la rusa lingvo. Intertempe mi forlasis CO kaj Nederlandon, kaj foriris al la najbara lando Germanio en Hamburgon. En Germanio dum diversaj Esperanto-aranĝoj mi denove renkontis Nikolaj. Li ne povis vivi sen Esperanto kaj ne estis simpla "turisto" – li ĉiam estis preta kontribui al la programo. Lia ŝatata "ĉevaleto" estis la fama verkisto Solĵenicin, kies poemojn li plejvolonte recitis. Sed tio kaŭzis la problemon, ĉar Sovetunio proklamis Solĵenicin "persona non grata" kaj protestis ĉe UEA se liaj verkoj estis en la programo. Tio tre kolerigis Nikolaj kaj sekve li tre blasfemis (plejofte ruslingve). Ankaŭ N.Ĥoĥlov estis en lia repertuaro. Mi volas rimarki ke Ĥoĥlov post la Revolucio vivis plurajn jarojn en Kroatio – en Zagrebo, kie li estis tre aktiva en Zagreba Esperanto-societo.

Nun mi revenu al Nikolaj. En la jaro 1972 la dua germana televida kanalo el Hamburgo decidis fari la filmon pri "Rusa Revolucio", kaj por la rolo de Lenin invitis Nikolaj. Do, ni denove renkontiĝis ĉe mi hejme kaj en hamburga Esperanto-societo. Post tio mi ne plu renkontis Nikolaj, kiu malsaniĝis kaj por ĉiam forlasis nin.

Jen, mi surpaperigis mian rememoron pri mia kara amiko Nikolaj, kaj mi bedaŭras se mi ion dumtempe forgesis – post 30 jaroj oni ne povas konservi ĉion en la kapo.

Eksciu, ke...

110 VIZITANTOJ EN LA MALFERMA TAGO

Jam por la 13-a fojo pleniĝis de vizitantoj la sidejo de UEA en Roterdamo dum la Malferma Tago sabaton, la 25-an de novembro. Entute 110 gastoj el 12 landoj ĝuis programon, kiu fariĝis pli riĉa ol antaŭanoncite.

La ĉefa gasto estis Spomenka Štimec, unu el la plej elstaraj nuntempaj Esperanto-verkistoj, kiu dufoje prelegis pri sia verkista aktivado kaj aŭtografis siajn librojn. Ĉar ŝi estas sekretario de la Loka Kongresa Komitato de la 86-a UK, ŝi uzis la okazon ankaŭ por doni freŝajn informojn pri la kongresaj preparoj. La librokulturan funkcion de la Malferma Tago plie emfazis la lanĉo de la Esperanta eldono de "La lada tambureto" de la Nobel-premiito Günter Grass. Ĉeestis kaj la tradukinto Tomasz Chmielik, kiu prezentis ĝin, kaj la eldoninto Georgo Handzlik, kiu regalis la publikon ankaŭ per trobadora koncerto. En la plenŝtopita biblioteko de UEA, kiu cetere funkciis kiel kinejo de Esperanto-filmoj, okazis krome prelego de Renato Corsetti, vicprezidanto de UEA, pri la nun preparata laborplano de UEA.

Por la libroservo de UEA la tago estis aparte laboriga. Libroj kaj aliaj varoj vendiĝis je la suma valoro de 4249,65 eŭroj (9365 guldenoj), kio estas la dua plej bona rezulto en la serio de Malfermaj Tagoj. Pleje furoris murkalendaro dediĉita al la Zagreba UK (28 ekz.), la romano de Grass (16) kaj nederlanda Esperanto-gramatiko (13). *(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

AGO-TAGO EN KIEVO

De la sabata tagmezo grupeto da aktivuloj el KJS (Kijiva Junulara Societo) kaj lernantoj de liceo №38 komencis la Ago-tagon sur la ĉefa placo de Ukrainio – Placo de Sendependeco kaj sur la ĉefstrato de Kijivo – Ĥreŝĉatik. Venis ankaŭ kelkaj "malnovaj gvardianoj". En la manoj de la gejunuloj estis flugfolioj "Kio estas Esperanto?", vizitkartetoj de KJS kaj folioj kun demandoj por la sociologia esploro. Kun tiuj materialoj ni "kroĉiĝis" al homoj. Dum kvar horoj estis pridemanditaj 128 personoj. La demandoj kaj respondoj estis jenaj:

1. En kiu lingvo vi preferas paroli, ĉu en la ukraina, ĉu en la rusa? Por 40 personoj estis pli facile paroli en la ukraina, por 70 – ruse, por 18 – en ambaŭ lingvoj.
2. Ĉu vi rimarkas, ke ukrainajn vortojn oni ofte senbezone anstataŭigas per fremdlingvaj? Tion rimarkas 93 kaj ne rimarkas 35.

Kongreso de Ukrainia Esperanta Asocio pasis en Kievo la 3 – 5-n de novembro 2000. Partoprenis 42 homoj el 18 urboj de la lando. Oni nomis kvanton de UkrEA-membroj al la tempo de la kongreso – 186 homoj – kaj konstatis, ke la organizo daŭre kreskas, nombre kaj kvalite. Rezulte de la elektoj la prezidanto de UkrEA denove iĝis Volodimir Hordijenko. *(K.Demjanenko)*

3. Ĉu povus neŭtrala lingvo Esperanto defendi la ukrainan? (Cetere, por la homoj tiu demando estis tute neatendita.) Tamen pozitive respondis 55 personoj! Negative respondis 45 personoj kaj 28 verŝajne ne komprenis la demandon.
4. Se okazus disputo pri tiu temo, ĉu vi partoprenus en ĝi? Jes – 63, ne – 65.

Do ĉiu povas fari siajn konkludojn. Estas interese, ke signife pli multaj homoj nun scias pri tio kio estas Esperanto. Tio estas rezultoj de nia aktiva pasint- kaj ĉi-jara ampleksa informado, farita enkadre de IJEK – Internacia Junulara Esperanto-Karavano. Eĉ unu laŭaspekte senhejmulo preterirante diris al mi: “Ha, mi scias, ke tiu lingvo komenciĝis en Bjalistoko”. Krome, enkadre de la Tago okazis ankoraŭ du eventoj. Unue, mi provokis intervjuon de la estrarano de TEJO Ilja de Coster (Belgio) en la ĵurnalo “Hodiaŭ”, kiu aperis 29.09.2000. En ĝi estas bone prilumita lingva situacio en Eŭropa Unio. Kaj due, la sekvan post la Ago-tago mardon mi havis duonhoran konversacion kun estro de Kijiva urba ĉefoficejo pri klerigo. Rezulte – informo pri Esperanto (“Motivado por instrui Esperanton” kompilita de mi) trafis al ĈIU(!) KIJIVA DISTRIKTA KLERIGOFICEJO. *(M.Lineckij)*

BELARTAJ KONKURSOJ DE UEA EN 2001

La gvida Esperanta artkonkurso, la Belartaj Konkursoj de UEA denove invitas partoprenantojn. La rezultojn oni anoncos en la 86-a Universala Kongreso en Zagrebo. Partopreno estas libera al ĉiuj kaj ne ligita al partopreno en la UK. La konkursaĵoj devas esti novaj kaj, escepte de la infanlibroj, antaŭe ne publikigitaj. Krome validas jenaj kondiĉoj:

Poezio: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Prozo: Maksimuma longo 200 x 65 tajpospacoj. Tri premioj.

Teatraĵo: Maksimuma longo ne fiksita. Tri premioj.

Eseo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la temo de la UK, “Kulturo de dialogo – Dialogo inter kulturoj”. Proksimuma longo 10 tajpitaj paĝoj (ĉ.400 x 65 tajpospacoj). Premio “Luigi Minnaja” kaj du aliaj premioj.

Kanto: Teksto kaj melodio povas esti de malsamaj aŭtoroj. Premio “An-Song-san” kaj du aliaj premioj.

Vidbendo: Teme ligita kun Esperanto aŭ kun la kongresa temo (vd. ĉe Eseo). Daŭro 15 ĝis 60 minutoj. Sistemo VHS/PAL. Tri premioj.

Infanlibro de la Jaro: Originala aŭ tradukita libro (alia ol lernolibro), presforme aperinta en la jaro 2000. Unu premio.

Oni rajtas sendi maksimume tri konkursaĵojn por sama branĉo. Por poezio, prozo, teatraĵo, eseo kaj kanto oni sendu ilin en kvar ekzempleroj; por la infanlibra branĉo en tri ekzempleroj. Ĉiuj alvenu plej laste la 31-an de marto 2001. Por vidbendo oni sendu po unu ekzempleron ĝis la 1-a de julio 2001. Ĉion oni sendu al: ***Belartaj Konkursoj de UEA, Nieuwe Binnneweg 176, 3015 BJ Rotterdam, Nederlando.*** La konkursaĵoj (krom vidbendoj kaj infanlibroj) estu pseŭdonimaj. La vera nomo kaj adreso estu en aparta koverto. Se eble, oni aldonu 5 internaciajn respondkuponojn por ĉiu branĉo, en kiu oni konkursas.

Premioj: 1-a premio: EUR 190; 2-a premio: EUR 133; 3-a premio: EUR 76; Nova Talento (por la plej bona konkursanto neniam premiita) EUR 133; Infanlibro de la Jaro: EUR 399.

Publikigo: La rajto je la unua presigo de la premiitaj verkoj apartenas al UEA, kiu

ankaŭ poste rajtos aperigi ilin senpage en antologio de la Belartaj Konkursoj.

Detala regularo haveblas kontraŭ unu respondkupono ĉe UEA, aŭ rete ĉe <uea@inter.nl.net>; ĝi troviĝas ankaŭ en la TTT-ejo de UEA <http://www.uea.org/esperanto/dokumentoj/regularo_belartaj_konkursoj.html> *(CO de UEA)*

15-MINUTA PRIESPERANTA TELEVIDELSENDO EN RUSIO

La 28-an de novembro okaze de 60-jara datreveno de la sekreta instrukcio de NKVD, kiu anoncis esperantistojn kaj filatelistojn malamikoj de la popolo, la programo "Nova malnova apartamento" (televidkompanio RTR, 2-a tutrusia kanalo) okazigis 15-minutan elsendon pri Esperanto. Komence estis invitita la sola en Moskvo viva atestanto de la kontraŭesperantistaj reprezalioj Nikolaj Borisoviĉ Zubkov, sed li lastmomente ekmalsanis. Do, anstataŭ li venis gvidanto de la klubo "Lev Tolstoj" Nikolao Gudskov, kiu estis intervjuita pri historio kaj la kaŭzoj de la reprezalioj, ideologio de E-movado, karaktero de la lingvo, rilato al Esperanto de Lev Tolstoj ktp. I.a., Gudskov diris, ke nun, dum la anglalingva tutglobiĝo, signifo de Esperanto-movado principe kreskas. Necesas rimarki, ke la rilato de la intervjuantoj al la temo estis tre bonvolema. *(Nikolaj Gudskov)*

KONKURSO DE INFANDESEGNOJ EN LA JARO 2001

Ni invitas ĉiujn instruistojn, kiuj regule aŭ foje invitis siajn gelernantojn al konkursa partopreno, denove sendi desegnaĵojn al: ***Esperanto en Vendomois, Les Monts, FR 41360 Lunay, Francio.*** Bonvenon al novaj partoprenantoj. Konkursaj reguloj:

JARA TEMO	Pri kio/ kiu vi revas ?	
FORMATO	minimume 40x30 cm	
KATEGORIOJ	A :	ĝis 7 jaroj
	B :	pli ol 7 ĝis 10 jaroj
	C :	pli ol 10 ĝis 14 jaroj
LIMDATO	25a de majo 2001	

Dorse de la desegnaĵoj notu la nomon, la aĝon de la infano, adreson de la lernejo aŭ E-Klubo kaj koncizan priskribon de la verko. Premioj estos atribuitaj po 3 en ĉiu kategorio. Ĉiu infano ricevos partoprenan diplomon. Libroj, kasedoj, KD, T-ĉemizoj k.a. konsistigos la premiojn. Vizitu niajn retpaĝojn: <http://www.esperantoenvendomois.fr.fm>. Nia ret-adreso: <esperanto.en.vendomois@mail.dotcom.fr>. *(ret-info)*



LIBRA REVUO

LA BIBLIOTEKO DE LIPECKA E-KLUBO RICEVIS SUBVENCION

UEA disdonis por la kvara fojo subvenciojn de la Biblioteka Apogo Roma kaj Poul Thorsen. Rekorda nombro de 28 Esperanto-bibliotekoj el 21 landoj sendis peton. La juĝkomisiono povis ĝojigi 15 bibliotekojn, inter kiuj estis dividita la sumo de 1800 eŭroj. La subvencion ricevis: Kataluna Esperanto-Asocio (EUR 250); Vjetnama Esperanto-Asocio (EUR 250); Bonaera Esperanto-Asocio, Argentino (EUR 150); Chengdu-a Esperanto-Asocio, Ĉinio (EUR 150); Esperanto-Biblioteko Novaj Horizontoj, Kolombio (EUR 150); Esperanto-Societo La Progreso, Prilep, Makedonio (EUR 150); Korea Esperanto-Asocio (EUR 100); Esperanto-Societo Bude Borjan, Zagrebo, Kroatio (EUR 100); Malta Esperanto-Societo (EUR 100); Kultura Esperanto-Centro de Angevin kaj Esperanto-Kulturcentro de Tuluzo, Francio (po EUR 75); Esperanto-Muzeo Lajos Gyula, Pecs, Hungario (EUR 75); Animada Klubo de Esperanto, Zambio (EUR 75); Bulgara Esperanto-Asocio (EUR 50); **Lipecka Esperanto-Klubo Revo, Rusio** (EUR 50).

Ekde la unua aljuĝo en 1997 ĝis nun entute 43 Esperanto-bibliotekoj povis pligrandigi siajn kolektojn per subvencio de la Biblioteka Apogo. Pro la multeco de la petintoj la subvencio ankoraŭ ne estis asignita dufoje al sama biblioteko. Petoj por la aljuĝo en 2001 devos atingi la Centran Oficejon de UEA ĝis la 15-a de oktobro 2001. Ilin akompanu listo de dezirataj libroj ordigitaj laŭ prefero, ĉar la subvenciojn oni ricevas ne kiel monon sed kiel librojn. Konsiderataj estas nur bibliotekoj, kiuj ne estas financataj de ŝtata, urba aŭ alia ekstermovada instanco. *(ret-info)*

Ĵus aperis la nova ilustrita librokatalago de FEL (Flandra E-Ligo). En la katalogo oni trovas priskribon de ĉiuj eroj, prezon, foton de la kovrilo kaj multajn aliajn utilajn informojn. La katalogo estas aŭtomate kaj senpage sendita al ĉiuj klientoj de la retbutiko kaj al ĉiuj abonantoj de Monato. Ankaŭ aliaj personoj povas ricevi ĝin senpage. Sufiĉas peti ĝin de <retbutiko@fel.esperanto.be>. (ret-info)

ĈEFVERKO DE GRASS EN LA SERIO ORIENTO-OKCIDENTO

La lada tambureto. Günter Grass. *El la germana trad. Tomasz Chmielik. Bielsko-Biala: KLEKS, 2000. 533p. Bind. Serio Oriento-Okcidento n-ro 33.*

Mejloŝtona verko en la postmilita germana literaturo, "La lada tambureto" de la Nobel-premiito Günter Grass, estas nun legebla en Esperanto. Tradukis ĝin Tomasz Chmielik kaj eldonis KLEKS, firmao de Georgo Handzlik, kiu apud pollingvaj verkoj lastatempe aperigis plurajn librojn en grafike altkvalita vesto ankaŭ en Esperanto. La tradukinto kaj la eldoninto lanĉis la libron en la Malferma Tago de la Centra Oficejo de UEA, kien ili portis ĝin laŭvorte rekte el la presejo, pretiginta la unuan kvanton en la tago antaŭ la Malferma Tago.

La apero de "La lada tambureto" ("Die Blechtrommel") en 1959 skuis ne nur la lit-

eraturan mondon sed ankaŭ pli vaste la germanan socion. Dum jaroj ĝi estis objekto de kritikaj atakoj, sed samtempe oni tradukis ĝin en dekojn da lingvoj. Hodiaŭ ĝi estas rekonita kiel la plej grava verko de la germana literaturo post la dua mondmilito. Poeto H.M.Enzensberger karakterizis ĝin: "Ĝi estas sagao de la Libera Urbo Gdansko, poezia provo savi antaŭ forgeso tiun malgrandan mondon, en kiu vivis kune poloj kaj germanoj, judoj kaj kaŝuboj". La aŭtoro mem naskiĝis en Gdansko en 1927 kaj pasigis tie siajn infanaĝon kaj fruan junecon.

Per "La lada tambureto" la eldonejo KLEKS partoprenas en la Serio Oriento-Okcidento, en kiu ekde 1961 aperas reprezentaj verkoj de naciaj literaturoj el diversaj partoj de la mondo. La Serio estas aŭspiciata de UEA, kies estraro decidas pri la akcepto de novaj verkoj en ĝi. Per la Serio UEA kontribuas al la programo de Unesko por reciproka aprezado de kulturoj de Oriento kaj Okcidento. *(Gazetaraj komunikoj de UEA)*

LA PREMIO AL WILLIAM AULD

La Sepan Esperanto-Kulturpremion de Aalen, en solena matineo en la urba biblioteko, la FAME-fondaĵo por stimulado de internaciaj kompreniloj transdonis al William Auld, unu el la plej gravaj kreantoj de Esperanto-kulturo en nia epoko. La premio estis dotita per 10 000 germanaj markoj. La laŭdacion digne faris d-ro Werner Bormann, prezidanto de la FAME-fondaĵo, antaŭa prezidanto de la Akademio de Esperanto, kiu mem, simile al la premiito, okupis multajn poziciojn en la organizita Esperanto-movado, tiel montrante kombinon de intelekta laboro kaj tute konkretaj organizaj taskoj. En germana lingvo, por la ĉeestantaj reprezentantoj de la publika vivo – urbo, gimnazio, distrikta banko kaj aliaj – li skizis la diversajn facetojn de la verkaro de William Auld. El la posedo de la Germana Esperanto-Biblioteko, kies sidejo troviĝas en la sama domo kiel la urba biblioteko de Aalen, estis elmontritaj la plej gravaj el la libroj de la skota majstro – poezio, tradukoj, instrua materialo, eseoj. Gravaj personoj el la monda kultura vivo pasintjare trovis William Auld inda esti kandidato por la literatura Nobel-premio, kio en si mem vekis grandan atenton ne nur en la skota gazetaro. Karl Heinz Schaeffer, Aalen/Germanujo *(ret-info)*

Mendu la lernolibron:

M.Abolskaja. Lernolibro por komencantoj. 88 paĝoj. Formato A4. Tipografia eldono. La lernolibro konsistas el 25 lecionoj, gramatika resumo kaj du vortaroj: E-rusa kaj rusa-E. Ĉiu leciono enhavas vortareton, gramatikon, ekzercojn, tekston por legado, kontroltaskon. Al kelkaj ekzercoj estas donitaj la solvoj. La lernolibro taŭgas por korespondaj kaj ĉeestaj kursoj. Unu ekzemplero kostas 25 rub. inkluzive sendokoston. Por tiuj, kiuj mendos pli ol 5 ekzemplerojn, estos rabato laŭ antaŭa interkonsento. La adreso: ***Abolskaja Maria Solomonovna, a/k 381, 197022 St.Peterburgo.***

TIAN LIBRON NI ANKORAŬ NE HAVIS!

А.С.Мельников. Портрет идеи с чудаками вместо фона, или язык доктора Надеющегося. *160 paĝoj vinktitaj. Rostov-na-Donu, 1997.*

Ĉi tiu libro estas specimeno de ĝenro, kiun ne eblas difini precize, sed kiu aktive konkeras atenton de junaj kaj ne tro junaj legantoj tra la tuta mondo, ĉar baze de la ĝenra ambigueco de ĉi-speca literaturo kuŝas la principo de "instruo tra amuzo". Tamen la recenzata libro tute ne estas lernolibro. La aŭtoro kunveturigas nin en romantikan kaj forportan vojaĝon tra la

mondo de Esperanto kaj esperantistoj, tuŝante samtempe la historion de la internacia lingvo Esperanto, ĝiajn lingvajn specifaĵojn, ĝeneralajn problemojn de transnacia komunikado kaj metodiko de fremdlingva studado (“Lernado sen torturado!”), pri kiuj okupiĝas la aŭtoro – UEA-Delegito, adjunkto de AIS, renoma fakulo en la sfero de la scienco pri internaciaj lingvoj – interlingvistiko.

La libro konatigas la legantojn ne nur kun faktoj, sed (kaj antaŭ ĉio!) kun la aparta etoso de E-movado, kiu kreas mirindan komunumon el homoj de diversaj aĝoj kaj nacioj kaj iel mistere ŝanĝas ilian psikologion kaj konceptaron. Ne serĉu en la libro de A.Melnikov severan sciencan konsekvencecon kaj obeon al la didaktitaj normoj de lernaj libroj. Enestas nenio tia! La libro legiĝas kiel forporta beletra verko. En viveca kaj atento-kapta formo estas donitaj informoj pri la vivanta pli ol 110 jarojn artefarita sed nature evoluanta internacia lingvo, pri ĝia parolantaro kaj E-organizoj. Kun miro ni ekscias pri la diapazono de la E-movado, pri la “tutmonda esperantista helpemo”, ilia aktiveco en la solvado de la tuthomaraj, ĝeneralkulturaj, politikaj kaj ekologiaj problemoj, proksima kunlaboro de la “esper-adeptoj” kun Unesko. La libro estas pri tio, sed ankau pri alio. Nur legu la titolojn de la ĉapitroj: “Majstroverko de logikeco kaj simpleco (ĝi, kompreneble, estas pri Esperanto)”, “Taglibro de ripozanto (scenoj el esperantista vivo aŭ SEJTo per la okuloj de laiko)”, “Esperanto-Muzoj en Rostovo (kiel ni vidis tion, kio “eblas neniam”, aŭ “Esperanto kaj arto – du aferoj ne kunigeblaj?”)”, “Krokodiloj ne eniru (ripozante, ni lernas; neformalaj internaciaj renkontiĝoj de la “verdaj amikoj”)” ktp. La ĉapitroj, titolitaj tiel malbanale, inkludas, krom la ĉeftemon, amason da utilaj kaj interesaj informoj. Ili konatigas nin kun pitoreskaj, priskribataj ne sen humuro, detaloj de komunikado kaj kunripozado de esperantistoj en internaciaj kaj landaj E-tendaroj, kun rememoroj de la aŭtoro pri siaj multnombraj “E-aferaj” eksterlandaj veturoj. Ŝajna nekonsekvenceco de la rakontado ebligas mergiĝi en la mondon de la homoj, serĉantaj helpe de la “espero-lingvo” respondojn al la eternaj demandoj pri la loko de la homo en naturo kaj historio, pri infanedukado, pri trarompo de la naci-limaj barieroj.

Do, bonvenon en la multkoloran mondon de Esperanto! La ideo de la “malordinaruloj/stranguloj” adeptoj de la lingvo-kreinto L. Zamenhof nominta sin Doktoro Esperanto estas kontaĝa. Kial – vi komprenos leginte la libron de A. Melnikov. Bonvojaĝon al la lando Esperantujo!

V. Ŝvedova, kandidato de filologiaj sciencoj, docento.

P.S. Por aĉeti la libron kaj ricevi konsilojn pri ĝia utiligo por la popularigo de Esperanto kontaktu la aŭtoron: Melnikov Aleksandr Sergeeviĉ, a/k 393, RU-344007 Rostov-na-Donu-7; rete: <aleks-meln@mail.ru>.

ESTAS ABONEBLAJ PERIODAĴOJ POR 2001 JARO:

LA ONDO DE ESPERANTO. Sendependa ĉiumonata revuo (eldonata en Jekaterinburg); 11 num. 20 p. riĉe ilustrita; literatura suplemento jarfine; 145 rubloj.

RUSLANDA ESPERANTISTO. Ruslingva informilo pri Esperanto; 6 num. 4 p. 30 rubloj (por la abonantoj de “La Ondo de Esperanto” – nur 15 rubloj).

ESPERANTO. Oficiala organo de UEA; 12 num. 24 p. ekv. de 14 EUR.

HEROLDO DE ESPERANTO. Internacia sendependa gazeto de Esperanto-movado; 16 num. 4 p. A3; ekv. de 15 EUR.

JUNA AMIKO. Revuo por lernejanoj kaj komencantoj; 4 num. 32 p. ekv. de 4 EUR.


KONTAKTO. Soci-kultura revuo por junularo; 6 num. 16 p. ekv. de 9 EUR.
LA GAZETO. Kultura revuo en Esperanto; 6 num. 32 p. ekv. de 6 USD.
LA JARO. Praktika poŝkalendareto de Monato; 2 volumetoj; 160 p. ekv. de 5 EUR.
LITERATURA FOIRO. La plej prestiĝa kultura revuo en Esperanto; organo de esperanta PEN-centro; 6 num. 56 p. ekv. de 14 EUR.
LITOVA STELO. Revuo de Litova Esperanto-Asocio; 6 num. 32 p. ekv. de 6 USD.
MONATO. Internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo; 12 num. 32 p. ekv. de 17.50 EUR.
TEJO TUTMONDE. Oficiala organo de TEJO; 4 num. 28 p. ekv. de 5 EUR.
SCIENCO KAJ KULTURO. Scienc-populara kaj literatura revuo; 6 num. 180 rubloj.
LA MIGRANTO. La organo de E-Fako de la Naturamika Internacio (TANEF); 4 num. ekv. de 5 USD.

La abonkosto sendendas laŭ la aktuala kurzo de Centrobanko al la adreso: **Чертилову Михаилу Константиновичу, а/я 21, 143006 Москва-Одинцово-6** (eblas ĝiri per banko, petu bankajn donitajhojn).


"LA HOBITO" APERIS EN ESPERANTO!

Post sukcesa eldono de la trivoluma verkego "La Mastro de l' Ringoj" de J.R.R.Tolkien, en la traduko de William Auld, "Sezonoj" (Jekaterinburg) eldonis plian verkon de Tolkien – la faman mirfabelon "La hobito". William Auld partoprenis en la tradukado de "La hobito" per esperantigo de la poeziaĵoj, sed la tutan prozan parton tradukis d-ro Christopher Gledhill el la universitato de St.Andrews (Skotlando). "Sezonoj" eldonis "La hobito"-n kiel la naŭan volumon en la libroserio "Mondliteraturo". La libro havas 224 paĝojn, fortikan bindon kaj trikoloran kovrilon de Maŝa Baĵenova. Ŝi kreis ankaŭ bildojn por ĉiu ĉapitro. "La hobito" estas mendebla poŝte ***(RU-620014 Jekaterinburg-14, a/k 162)*** aŭ rete: <sezonoj@mail.ru>. La baza prezo estas 24 eŭroj, sed esperantistoj en Rusio povas aĉeti ĝin perpoŝte kontraŭ 65 rubloj (inkluzive de la sendokosto) aŭ en la librovendejo de ULS en Jekaterinburg kontraŭ 59 rubloj. Bonan legadon!

REU ELDONIS DU NOVAJN LIBROJN



Ambaŭ libroj havas po 104 paĝoj kaj kostas 25-30 rublojn (sen sendokosto) depende de la kvanto. Por akiri la librojn kontaktu Jurij Karcev ***(432063, Uljanovsk-63, a/k 4716; rete <yuka@chat.ru>)*** aŭ Garik Kokolija (se vi estas en Moskvo). Ankaŭ ĉe Jurij eblas akiri metodikajn broŝurojn pri E-aktivado, petu de li detalajn informojn pri tiuj.



KURTE

Esperanto pontas en Teo-Festivalo. La 18-21-an de majo 2001 en fama teohejmloko Xinyang, Ĉinio okazos la 10-a Xinyang-a Teo-Festivalo, organizata de la urba registaro. Dum la festivalo oni aranĝos negocan ekspozicion, artajn programojn, ekskurson ktp. Laŭ la propono de s-ro Zhang Xuesong, la organizantoj decidas prezenti mondan teokulturon en la festivalo, inkluzive de teo-ceremonio, diverslokaj moroj de teumado ktp. Esperanto funkcias kiel ponto en la aranĝo. Dum la festivalo okazos ankaŭ la Simpozio de E-komerca Kunlaboro, esperantistoj, komercistoj kaj ekonomiistoj estas tre bonvenaj. Pliaj informoj ĉe ***s-ro Zhang Xuesong, Changtaiguan Dianguansuo, CN-464193 Xinyang, Henan, Ĉinio;*** tel.: +86-376-882 1553; retadresoj: <deodaro@263.net>, <h nxychyj@public.lyptt.ha.cn> *(ret-info)*

Japana Esperantista Go-Asocio (JEGA) jam malfermis kaj funkciigas interretajn retpaĝojn, en lingvoj japana kaj Esperanto ĉe http://www12.freeweb.ne.jp/art/jega/ mastrumatajn de Inĝeniero MORI Hitoŝi (retpoŝte: YIX10152@nifty.ne.jp). Tiu paĝo intencas esti ilo instrua por komencantoj, amatoroj kaj profesiuloj, estonte oni kaj daŭrigos kaj ampleksigos ĝin. Por Esperanto-parolantoj ekzistas la sekcioj: Kio estas Goo?; Historio de Goo; Kiel ludi Goon?; Libro "Invito al Go-Ludo" kaj aliaj. *(ret-info)*

Tago de la Malfermita Pordo en IEM. La 26-an de oktobro la Nacia Biblioteko en Vieno havis sian tradician "Tagon de la Malfermita Pordo". Pro tio ankaŭ la Internacia Esperanto-Muzeo (IEM) akceptis inter la 10-a kaj la 17-a horoj vizitantojn – per speciala programo: S-rino Smideliusz el Hungario ĉiuhore prezentis Esperanton per la Ĉe-metodo, t.e. uzante nur la internacian lingvon, sen iu ajn nacilingva klarigo. La esenco de tiu instruado konsistas en la kreo de amuzaj komunikaj situacioj, en kiuj la partoprenantoj tuj komprenas la vortojn de la instruistino – samtempe amuziĝante. Vizitis la Muzeon en tiu tago entute 357 personoj, inter kiuj 86 partoprenis en la kursoj. Duono de ili estis el eksterlando, precipe el Ĉeĥio kaj Slovakio, sed ĉeestis ankaŭ rusoj, hispanoj, japanoj, svisoj ktp. La bonan efikon de la aranĝo oni vidas en tio, ke post tiu tago ses novaj personoj aliĝis al Esperanto-kurso en popola altlernejo, pri kiu oni varbis en la Muzeo. ***Herbert Mayer*** *(ret-info)*

KAEST 2000: renkontiĝo de fakaj aplikantoj de Esperanto. Dum la tagoj 10-a ĝis 12-a de novembro okazis en Prago Kolokvo "Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko" kiun aranĝis Ĉeĥa Esperanto-Asocio kiel sian kontribuon al Kampanjo 2000 sub aŭspicioj de UEA. En ĝi partoprenis entute 41 personoj el 11 landoj. Traktado okazis en tri sinsekvaj sekcioj, nome: Ekonomio sojle al la tria jarmilo (7 kontribuoj), Terminologiaj problemoj de fakaj aplikoj de Esperanto (10 kontribuoj) kaj Scienco kaj tekniko ĝenerale (4 kontribuoj). ***Petro Chrdle*** *(ret-info)*

En la urbo Lodz, Polio ĉe fino de la jar-

milo estis realigita ideo rememorigi 33 personojn meritajn por la urbo. Sur la muro de domo staranta ĉe Piotrkowska strato, ĉefa strato de malnova parto de la urbo aperis granda fresko. Pentraĵo imitas la muron de konstruaĵo kun pordego, balkonoj kaj fenestroj, tra kiuj rigardas historiaj personoj. Inter portretoj de eminentaj homoj de kulturo, scienco, politiko kaj lodza industrio oni povas vidi ankaŭ la portreton de Ludoviko Zamenhof. ***Aleksander Kaminski*** *(ret-info)*

Dezirantoj akiri la kasedojn kun E-kantoj en plenumo de Galina Lukjanenko bonvolu kontakti ŝin laŭ la adreso: ***str. Muĥaĉjova 111 – 56; 659300 Bijsk (Altajskij kraj).***

Scienc-Praktika konferenco. La 9-a Internacia Scienc-Praktika Konferenco "Banlokoj, Naturdefendo, Klerigado" okazos inter 19-20.04.2001 en Sankt-Peterburgo. Dum la aranĝo la unuan fojon eksperimente Esperanto estos uzata kiel dua laborlingvo – krom la rusa. En tri sekcioj de la konferenco renkontiĝos fakuloj pri sanatori-banloka sanigado, saniga turismo, ekologoj kaj specialistoj pri instruado de la cititaj profesioj. Estus tre dezirinde disvastigi ĉi informon inter la koncernaj esperantistoj-fakuloj. Pli detalajn informojn pri la konferenco eblas peti ĉe ***"Orgkurort", ul.Gagarina 20-6-116, RU-196211, Sankt-Peterburg.*** Rete <anatolog@mail.ru>


Post kiam Adamo estis kreita, li estis sola en La Ĝardeno Edena. Kompreneble, ne estis bone ke li ekzistas tiel solece, do la Sinjoro malsupreniris por viziti la kompatindan homon. "Adamo," Li diris, "Mi havas planon, kiu celas multe pli kontentigi vin. Mi donos al vi kunulon, helpanton por vi – iun kiu plenumas ĉiun vian deziron kaj bezonon; kiu estos fidela, amema kaj obeema, kiu sentigos vin mirinda je ĉiu tago de via vivo."
Adamo estis mirfrapita. "Tio ŝajnas ne kredebla!"
"Nu, vere estas tiel," respondis Dio, "Do, vi devas kompreni ke tio ne estos senpaga. Fakte, tia ulo estas tiel unika, ke tiu kostos al vi brakon kaj kruron."
"Estas altega prezo!" diris Adamo. "Kion mi povas aĉeti kontraŭ ripo?" *(esperanto-anekdot)*

TTT-paĝoj pri sekvajara Internacia Junulara Kongreso (IJK) en Francio jam estas pretaj ĉe <http://esperanto.jeunes.free.fr/ijk2001/>. Plej gravas, ke oni enmetis aliĝilon por la aranĝo. Laŭkutime oni devas fari antaŭpagon por ricevi la invitilon (por Rusio – 25 eŭroj). La unua aliĝperiodo finiĝas la 3-an de januaro 2001.

La muzeo de Ciolkovskij en Kaluga planas fari la ekspozicion "Ciolkovskij kaj Esperanto". Kiu havas materialojn pri la temo – bv. telefoni: (08422) 43606 Ĉernov Vladimir Iljiĉ, aŭ kontaktu Valentin Melnikov telefone (095) 4336904, rete <vmel@hse.ru>.

Odesa junulara Esperanto-klubo "Verdaĵo" organizas 2-n Junularan Ekologian Renkontiĝon "Kristnaska Birdokalkulo" la 5-7-an de Januaro 2001. En la programo: ekskurso al la naturo por Kristnaska Birdokalkulo, Urboludo, vizitoj al Zoologia kaj Botanika Ĝardenoj, eble al Observatorio (depende de la vetero), Vespero de sorĉaŭguroj kaj Intelektaj Ludoj en la klubo "Verdaĵo", ekskursoj al kulturaj aranĝoj ktp. Aliĝkotizo USD 5 inkluzivas pagon por ĉiuj ekskursoj, donacpakaĵon, 2 vespermanĝojn en la klubo. Loĝado senpaga en la domoj de junaj odesaj e-istoj. Bv. kontakti nin telefone: (8-10-38-0482) 233831, rete <verda99@mail.ru>, <krav@tm.odessa.ua> aŭ letere: ***Tintulova Vera, str.Dekabristov 16 – 1, 65000 ODESSA, Ukrainio.***

CERBE KAJ KORE



Ni plu prezentas al vi la plej valorajn kaj interesajn materialojn el la bulteno de Moskva Literatura Esperanto-klubo kaj ankaŭ novajn verkojn, kiuj meritas diskonigon ne nur en malvasta kluba rondo. Hodiaŭ ni traktas unu el la eternaj temoj:

KIO ESTAS POEZIO?...

Valentin Melnikov

Ĉu kun aŭ sen?

Okcidenteŭrope oni nun konstante ripetas, ke klasikforma poezio definitive eksmodiĝis, ritmo kaj rimoj ne plu bezonatas ktp. Sonas pimpaj vortoj pri tio, ke la poeta penso, liberigita de striktaj katenoj de ritmo kaj rimoj, pli bone esprimas sentonuancojn kaj senpere atingas legantojn. Samlogike eblus aserti, ekzemple, ke domo, liberigita de striktaj katenoj de fundamento kaj muroj, povas esti pli bela kaj komforta... Tio estas komuna plago de ĉiuj artoj en nia jarcento: svarmego de arogaj diletantoj – sen bazaj scioj kaj posedo de elementa tekniko, ili pigras lerni, sed volas nepre famiĝi. Ju pli okul-(orel-)frapa estas la kreaĵo, des pli grandas la ŝanco, ke iu ĝin atentos kaj ne riskos kritiki, timante akuzon pri "nekompetenteco". Ĝuste en tio nestas la esenco de ĉiuj modernismoj kaj avangardismoj kun diversaj prefiksoj.

Bona poezio trovas resonancon en homa animo, oni ĉiam denove revenas al ŝatata poemo, ripetas ĝin en diversaj cirkonstancoj, serĉante konsilon aŭ konsolon. Oni parkerigas la poemon en junaĝo kaj povas reciti ĝin post jardekoj – certe, se ĝi indas. Ritmo kaj rimoj estas la plej efika memorfiksilo, kaj se publiko aprezis la poemon – tiu povos vivi jarcentojn. Tamen, ĉu iu kapablas precize reciti ion el nunaj "avangardaj" poeziaĵoj, lozaj kaj plumpaj, almenaŭ duonjaron post tralego? Certe ekzistas trafaj metaforoj, freŝaj vortkombinoj k.s., tamen kial rifuzi la plej potencan armilon, fidele servantan dum jarcentoj?

Mi ne asertas, ke inter "liberaj" versaĵoj tute forestas majstraj verkoj. Tamen ordinare ili perdiĝas en amasego da diletantaĵoj. Krome, vere bona poeto devas ja scipovi verki ĉiel, eĉ se li havas specifajn preferojn en stilo. Tio memevidentas samkiel la fakto, ke ĉiu muzikisto devas scipovi ludi pianon kaj legi-skribi muziknotojn (kvankam pluraj popularaj modernaj "steloj" ja ne scipovas!).

Antaŭnelonge itala korespondamiko (mem li beletron ne verkas, kaj eĉ la opinio, esprimita de li, ne estas lia propra – do lia nomo absolute ne gravas) post sufiĉe longa kaj arda tiutema diskuto kun nia samklubanino Klara Ilutoviĉ sendis al ŝi la liberan versaĵon de itala E-poetino Clelia Conterno (1915–1984) kun memfida aserto, ke esprimi tion kun rimoj tute ne eblas. Klara akceptis la defion kaj, miaopinie, perfekte pruvis la malon. La rezulton vi vidos sur la apuda paĝo, kaj mi ŝatus fini tiun ĉi pledon per unu el miaj sonetoj, traktanta la saman temon:

“Folio velka falas sur animon...” –
delonge jam konatas la lini’.
Klasika jamb’, facilas trovi rimon, –
ĉu ion novan povus diri ni?
Por emocioj serĉas mi esprimon,
sed pretas la kondamna opini’:
“Ne decas plu kreskigi oldan ŝimon!”
“Eksmodas poezia harmoni’!”
“Sen rim’, sen ritmo – jen la vers’ moderna;
liberas vortoj, kaj ne gravas senc’
en la poemoj. Klaras ja tendenc’!”
...Sed restas ankaŭ la valor’ eterna:
Ne velkas la folio sur anim’,
se noblan senton gardas nobla rim’.

LA ATENDITO

Clelia Conterno

Vi faris
el doloro ĝojon
el la plor’ rideton
el ofer’ donacon
el la viv’ altaron
kaj florojn el la dornoj
kaj lumon el obskuro
kaj fajron el la frosto,
vi
revo de ĉiu sopiro
brilo de ĉiu aŭroro
flamo de ĉiu fajrero,
vi, Atendito.

Klara Ilutoviĉ

Vi kreis ĝojon el doloro,
kuraĝan vorton el hezito,
Rideton el ĉagren’ kaj ploro,
vi, atendito.
El dorno vi estigis floron,
vi skulptis ondon el granito,
vi naskis el ofero gloron,
vi, atendito.
Vi estas rev’ de ĉiu koro,
flam’ de l’ naturo kaj spirito,
en ĉiu brilas vi aŭroro,
vi, atendito.

Ĉio ĉi aperis en la provnumero de “Cerbe kaj Kore” antaŭ du jaroj. Ŝajne, ĉio klaras kaj evidentas, ĉu ne? Pledantoj por “libera” poezio nenion prezentis por apogi sian vidpunkton. Kaj intertempe aperis novaj verkoj de niaj klubanoj pri la sama temo...

Miĥail Povorin (Moskvo)

ĈU POEZI’ AŬ NE?

Ĉu poezi’ aŭ ne? Decidu mem.
Ĉu vekas verko iom da kortrem’,
Aŭ estas nure bela plekto rima,
Plenplena fanfarone ĝis ekstrem’
De elpensaĵ’ bizare nekutima?
Ĉu la enhav’ kaj form’ en kun’ intima
Amikas laŭ la ritmo de poem’?

Ĉu donos iam ĝermon tiu sem'?
Ĉu poezi' aŭ ne? Decidu mem.

Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

KIEL VERSI?

Malkonkordo ne ĉesas
en disput' la fervora:
Ĉu rimado necesas
por versaĵ' plenvalora?

Senrimeco forlavas
versliniojn eĉ skizajn.
Senrimaĵoj ne havas
kriteriojn precizajn.

La versaĵo en prozo...
La prozaĵo kantebla...
Ĉiu svaga supozo
pri la verk' estas febla.

Tremas la ambigua
formo, ĝenro aŭ speco.
Ĝia signo l' unua
estas la ekzakteco.

Sen ideo densnuba,
sen malklaraj esprimoj –
poezi' la senduba
estas versoj kun rimoj.

Post apero de tiu ĉi versaĵo en la dissendolisto "kreado" (kaptante la okazon, mi alvokas Interret-uzantojn aboni tiun liston kaj partopreni en priliteraturaj diskutoj. Sendu malplenan mesaĝon al <kreado-subscribe@egroups.com>) Mikaelo Povorin replikis jene:

Saluton, karaj gekreadanoj!

Ĉi foje mi volas... pledi POR senrima poezio. Mi ja mem verkas rime kaj ĝenerale estas adepto de la moskva skolo de esperanta poezio. Sed ni vidu, kion skribas Klara Ilutoviĉ, kies verkojn kaj tradukojn mi ĝenerale tre ŝatas:

Senrimaĵoj ne havas
kriteriojn precizajn.

Aŭ pli ĝuste: estas malfacile formuli precizajn kriteriojn? Sed tio ne estas argumento kontraŭ senrima poezio, tio estas nur konstato, ke pridiskuti ĝin estas malfacile. Manko de bela formo devigas havi pli profundan enhavon. Kaj pli atenti necesas ĝuste la enhavon, ĉu ne? (Ĉu multas riĉenhavaj senrimaĵoj, estas alia demando.) Same: B.Tornado iam asertis, ke verki proze pli malfacilas, ol verse.

La versaĵo en prozo...
La prozaĵo kantebla...

Mi ja mem komponas kantojn, kaj eble pli ol iu ajn sentas mankon de taŭgaj kantotekstoj. Sed ĉu versaĵoj nepre estu kanteblaj?

Ĉiu svaga supozo
pri la verk' estas febla.

Pardonu, tiujn versojn mi simple ne komprenas. Kion Klara volis diri? Jen, bedaŭrinde, ekzemplo, ke rimo kaj ritmo malfaciligas verkadon kaj komprenon.

Tremas la ambigua
formo, ĝenro aŭ speco.
Ĝia signo l' unua
estas la ekzakteco.

Ĉu tio signifas, alivorte, ke senrimaj verkoj estas ekzaktaj, kaj rimaj ne estas?
Kaj, do finfine, la konkludo de Klara

Sen ideo densnuba,
sen malklaraj esprimoj -
poezi' la senduba
estas versoj kun rimoj

ŝajnas al mi dubinda.

Estime, Mikaelo Povorin

Certe, ekzistas verkoj geniaj kaj senvaloraj – kaj rimitaj, kaj senrimaj. La nivelo de klasikforma poeziaĵo kutime tuj videblas, sed inter senrimaĵoj distingi brilaĵon disde fuŝaĵo ne facilas. Delonge estas science pruvite (temas pri ekzakta matematiko, sed ne pri modaj nun pseŭdosciencoj, nebule vortĵonglantaj pri "kosma informa centro" kaj similaj fantazioj), ke ritma kaj rimita teksto enhavas multe pli da informoj, ol samlonga senrima – kaj pri forto de psikologia influo, ŝajne, superfluas paroli... Kaj kion opinias vi, kara leganto? Ne hezitu esprimi vian propran vidpunkton! Kaj ni finu nian tiuteman interparolon per bona kanto, kies multjara populareco per si mem diras – kia poezio povas akiri tutpopolan amon. Ĝis la nova renkonto!

Valentin Melnikov, la redaktoro de la literatura rubriko.

TRADUKITA KANTO

KANTO RESTAS KUN LA HOMO

(A.Ostrovskij–S.Ostrovoj / K.Ilutoviĉ)

1. Nokte steloj fluas foren laŭ rivero,
   kaj senspure dronas ĉe maten'.
   Sed por homo nur la kanto estas vero,
   lia granda porĉiama ben'.

Refreno: Iujn ajn distancojn vi trairu,
iom ajn da jaroj kaj sur ajna ter' –
"Ĝis revido" al la kant' ne diru,
kiel al eterna via ver'.

2. Niaj kantoj estas ĉiam en la koro,
   nin akompanante ĝis la fin'.

Multe kantis ni en ama nia horo,
multaj kantoj plu atendas nin.

3. En frosteg' la kanto estos graca varmo,
kaj en sunbrulado – akvoglut'.
Kiun kantoj ne ĝojigas per la ĉarmo,
tiu vivos ĉiam sen ĝojgut'.

LAŬSEZONAJ PAĜOJ

NEĜO

(A. Gorodnickij / V. Aroloviĉ)

Neĝo susuras en branĉa silent',
Krakas brulligno en flam'.
Dormas ankoraŭ amikoj en tend',
Revas ĉe l' fajro mi jam
Pri hejma varm' enletera,
Pri malproksima ĉiel'.
En norda vast' konifera
Post la aŭtun' efemera
Longas la vintra malhel'.
Neĝ', neĝ', neĝ', neĝ'
Falas ĉe l'tend' karusele.
Baldaŭ finiĝos por ni nokta malstreĉ'.
Neĝ', neĝ', neĝ', neĝ'
Kovras la tundron mantele.
Sur riverbordoj en frosta sieĝ'
Neĝ', neĝ', neĝ'.

Vin, karulino, ĉe bordo de Nev'
Kisas la neĝ' kun ridet'.
Jen brilas ĝi, kiel stelo de rev',
Jen flirtas apud pied'.
Tuŝas la prujn' delikata
Silkon de via harar',
Kaj en bulvardo konata
Blua vesper' leningrada
Ree densiĝas ĉe l' mar'.
Neĝ', neĝ', neĝ', neĝ'
Falas sur strat' karusele,
Ĝin vi ne sentas sur vang', nek vidas eĉ.
Neĝ', neĝ', neĝ', neĝ'...
Kion vi sonĝas fabele?
Super riveroj en frosta sieĝ'
Neĝ', neĝ', neĝ'.

Kantas la vento pri longa elten'
De niaj koroj en dis'.
Baras la vojon de mia reven'
Frosto, nebul' kaj glatis'.
Do rememoru sopire
Fajron de nia bivak'.
Fluge, navige aŭ ire
Trovos vin kant' laŭdezire
Eĉ en la plej ŝtorma tag'.
Neĝ', neĝ', neĝ', neĝ'
Falas en tajg' karusele,
Kaj malaperas sub ĝi la sleda spur'.
Neĝ', neĝ', neĝ', neĝ'...
Nun vi eksonĝu fabele
Kajon sunhelan, atendon de trajn'
Al la futur'.

Gennadij Gluĥov (Jelec)

AŬTUNA VESPERO


Aŭtuno venis nin hodiaŭ
Kaj baldaŭ venos blanka vintro,
Kaj sonas trista melodio
De pluvo sur fenestra vitro.
De la hejtilo venas varmo,
Mi bone sur divano kuŝas,
Kaj min neesprimebla ĉarmo
De interesa libro tuŝas.
El la radioaparato
Muzik' tenera zume sonas,
Kaj sur genuoj miaj kato
En duondormo plu ronronas.
Kaj la feliĉo tute plenus,
Kaj regus bela harmonio,
Se nur al mi hodiaŭ venus
De vi, amata, kvin linioj!

maltaŭgaj pensoj: KREDENCO

Tra la tuta rusia historio ruĝfadene trairas kelkaj plej gravaj demandoj. Inter la vere ĉefĉefaj estas: Kiu kulpas? Kion fari? Ĉu vi estimas min? Ĉu vi estos la tria? Hura: ankaŭ rusia E-movado havas sian Plej Gravan Demandon: kiel diri en Esperanto la vorton “тумбочка”? Jen konciza historio de ĉi demando. La etapan problemon enmondigis altestimata s-ro Georgij Vladimiroviĉ Kokolija (vicprezidanto de REU, ĉefredaktoro de REGo, partopreninto de UK-85), kaj pro tio ni esprimas al li apartan grandegan dankon. Ĉi tiu por la tuta movado grava demando unuan fojon sonis dum OkSEJT-35 (Jelec, 1994). Ni memoras kiel G.Kokolija rekte kaj sentime demandis la ĉeestintan publikon: Ĉu iu scias kiel diri en Esperanto “тумбочка”? Kaj ekde tiu momento nia socio falis en profundegan krizon. La komenca etapo de tiu problemo rapide superkreskis infanecajn provojn de rektaj elrusaj tradukoj. Multfoje plej spertaj lingve famuloj kunpuŝiĝis en ardaj diskutoj, sed la rezulto estis ĉiam la sama: neniu sukcesis traduki la simplan plaĉan rusan vorton “тумбочка”. Kelkaj eĉ diris, ke ili ĝuste antaŭ la OkSEJT vidis la vorton en iuj vortaroj, sed (kia koincido!) jam forgesis. Finis la diskutojn kaj lanĉis la duan etapon (ni nomu ĝin scienca) s-ro la tiama Ananjin (nun: Grigorjevskij, prezidanto de REU, eksa volontulo de TEJO en Roterdamo). Ni eĉ povas eltiri el la memorruinoj la gloran momenton. Estis diskutrondo pri SEJM-aferoj en la manĝejo de la tendaro. Dum iu eta paŭzo en la konversacio nemalvaste konata s-ro P.Fiŝo sin turnis al A.Ananjin kun La Demando: Ĉu vi scias kiel diri en Esperanto “тумбочка”? Kaj la Andreo, fosante paperojn kaj tute pretere, respondis: Kredenco. Ĉiu ĉeestinto de ĉi interparolo (eĉ interparoleto) tuj post La Vorto sentis ke kvazaŭ iu pezego falis for de la animoj. La postaj tendaraj tagoj trapasis sub la signo da La Kredenco. Ĝuste tiu kaŭzo puŝis rusian esperantologion laŭ la nova vojo. Multaj personoj eĉ ekdeziris lerni Esperanton. Sed nelonge daŭris la trankvila periodo de nia vivo. Aperis en niaj vicoj personoj, kiuj semis dubemon kaj skismon, kaj tiuj kamaradoj (kiuj certe ne estas niaj kamaradoj) kun perversa pensmaniero eĉ insistas ke en PIV la vorto Kredenco havas iun alian, tute ne taŭgan sencon. Sed ni firme respondas al tiuj niaj kvazaŭaj samkupeanoj: kiu verkis vian PIVon? Kiu legis tiun PIVon? Kaj, finfine, kiu vidis tiun PIVon? La tria etapo dume ne komenciĝis, kaj ni esperas, ke ĝi efektive ne komenciĝos. Ni, rusiaj geesperantistoj, volas scii: kiel diri en Esperanto la vorton “тумбочка”. Ĝis nun neniun varianton krom Kredenco ni konas, kaj ĉi varianto plene kontentigas nin. La deziro scii ĉi tiun vorton superplenigas niajn animojn, kaj tial ni postulas de la insistuloj pri ne-тумбочка-a signifo de la vorto Kredenco: diru al ni la korektan (laŭ vi) varianton. Ni tuj ekuzos ĝin. Sed la insistuloj silentas post ĉi demando. Do, neglektu ni ĉi deklarojn kaj plu opiniu ke la Respondo al La Plej Grava Demando de rusia E-movado estas ĝuste “Kredenco”. Ni ne permesu al diversaj livaj kamaradoj fendi nian altmoralan E-socion.

Amike viaj Ludovikoj Lazaroj Zamenhofoj





REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) ***№ 2 (2) decembro 2000***

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija retpoŝto: kokolija@mail.ru
telefonnumeroj: +7 (095) 5677007, 7524792

por tiu ĉi numero kunlaboris
Viktor Aroloviĉ, Grigorij Arosev, Oleg Kuznecov, Valentin Melnikov
la fotoj pri la jubileo en Krasnojarsk estas faritaj de Alla Jaĥina, la foto kun JoMo (malsupra dekstra sur la dua kovrilpaĝo) – de Oleg Demjaŝev, ĉiuj ceteraj fotoj en la numero – de Garik Kokolija
la gazeto estas presita en la tipografio "Policvet" (u.Klin)

abontarifoj por 2001:
por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 60 rubloj
sendendaj al **Георгий Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 123310 Москва**
por loĝantoj de aliaj landoj – 10 eŭroj, pagendaj al la konto kklg-r *ĉe UEA*